

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

4

1999

ISSN 0032 - 4361



Profesia edukado en Ĉinio

"Libro el ligno"

Revenu al la naturo



Malgrandaj ŝarkoj

de LUAN JAUPI (Albanio)

Ĉiuj turistoj, kiuj amas la naturon kaj hortikulturon, vizitu la Internacian Hortikulturajn Fojron en Kunming, kiu inaŭguriĝos maje ĉi-jare, en la vegetaĵa regno Yunnan, Ĉinio. Tie kolektiĝos floroj ne nur de Ĉinio, sed ankaŭ de la tuta mondo. Tie parados ankaŭ mirinda majstreco de hortikulturistoj. La artikolo "Revenu al la naturo" konigas la ĝeneralajn trajtojn de la foiro. Post tio ni daŭre informos la foiron en la venontaj numeroj.

En 1999 okazos en Ĉinio alia internacia konferenco — la Monda Arkitekta Konferenco. Ja estas bone konate, ke ĉiuj konstruaĵoj estas destinitaj origine por loĝado kaj ili ĉiuj odoras tribajn kaj naciajn kulturojn kaj morojn, kiuj diferencas ne nur en projektaj ideoj kaj estetikaj vidpunktoj, sed ankaŭ en materialoj. La artikolo "Libro el ligno" kaj la koncernaj fotoj konigas la diferencojn de la konstru-materialoj ĉinaj kaj okcidentaj. De ĝi oni informiĝas ankaŭ pri la origino, evoluo kaj abundaj formoj de ĉinaj lignaj konstruaĵoj.

Nia revuo iam konigis profesian edukadon. Kun evoluo de la ĉina ekonomio kaj pliiĝo de la bezono de diversflankaj laborantoj, rapide disvolviĝas profesia edukado en diversaj manieroj. Tiu disvolviĝo favoras la gejunulojn, malsukcesintajn en ekzameno por altlernejoj, kaj havigas al ili multajn ŝancojn por lerni kaj labori. "Profesia edukado en Ĉinio" donas pliajn informojn ĉi-rilate.

La artikolo "Respektataj virinoj" ne nur konigas la rolon de ĉinaj hani-aj virinoj en la familio kaj socio, sed ankaŭ prezentas tradicion kaj morojn de tiu nacio.

La Red.

El Popola Ĉinio

4 [487] 1999



Gaja glitado Foto de Zhao Xi

Granda senlacia glitejo nove konstruita en la okcidenta antaŭurbo de Pekino ebligas al glitamantoj sporti ne nur en vintro, sed ankaŭ en la aliaj sezonoj.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com


Hejmpaĝo:

<http://www.china.org.cn>

/ElPopolaCxinio>

ENHAŬO

- | | |
|---|---|
| 2 INTER NI | 35 Tagmanĝo en franca kampara restoracio |
| 4 Profesia edukado en Ĉinio | 36 Makao, ponto inter la kulturoj orienta kaj okcidenta |
| 6 EKONOMIE:
Nova agara leĝo; Batalo kontraŭ kontrabando; Kurantaj aferoj | 38 MULTNACIA ĈINIO:
Respektataj virinoj |
| 8 ĈINAJ E-ISTOJ:
Li malgrasiĝis pro nova ŝako | 40 JUNULARO:
"Amo en la tempo de reto" |
| 10 Por ĉiam juna Dai | 42 EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 12 40-jariĝo de Esperanto-redakcio de Pola Radio | 43 KORESPONDI DEZIRAS |
| 14 ORIGINALE VERKITAĬ:
Poemoj | 44 Ĉinio reakiris 3000 historiajn restaĵojn |
| 15 POR KOMENCANTOJ:
"Panjo!" | 46 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Ĉinaj kutimoj ĉe la manĝotablo |
| 16 ESP-NOVAĴOJ | 48 Vivo en malliberejo |
| 17 Revenu al la naturo | 50 AMUZO |
| 18 Grandioza ekspozicio sur la ĉielo | 51 ĈINAJ METIARTAĴOJ:
Botelo kun bildo de drako en nuboj |
| 20 Kial ili forlasis sian antaŭan okupon | 2 FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Malgrandaj ŝarkoj
SUR LA DORSKOVRILO:
Lijiang-rivero |
| 22 Islamanoj en Niujie | |
| 24 "Libro el ligno" | |
| 29 HOMARO KAJ NATURO:
Esplorado de glacio | |
| 32 Mengshan-teo | |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|---------------------|----------------------|
| 1. Chengdu (p. 8) | 4. Makao (p. 36) |
| 2. Hangzhou (p. 42) | 5. Lianjiang (p. 16) |
| 3. Yunnan (p. 38) | |

Profesia edukado en Ĉinio

- Antaŭ 1979 la profesia edukado ankoraŭ mankis en Ĉinio.
- La diplomitoj el la profesiaj mezlernejoj estas anticipe akceptitaj de la bezonantaj entreprenoj.
- Diplomitoj el la profesiaj mezlernejoj eminente faras la laboron en iuj postenoj, en kiu ne lertas tiuj el altlernejoj.
- La profesiaj mezlernejoj donas pli grandan atenton al kunlaboro kun la entreprenoj, kiuj bezonas iliajn diplomitojn.

de PANG NAIYING

ANTAŬ ol Ĉinio ekpraktikis la reformadon kaj pordomalfieron en 1979, la profesia edukado estis subveoluinta en Ĉinio. La diplomitoj el mezlernejoj plejparte ricevis nenian profesian trejnadon antaŭ ol trovi okupon. Siatempe, la mezgradaj kolegioj por instruistoj kaj teknikistoj konsistigis ĉefan parton de la ĉina profesia edukado.

Teknikaj mezlernejoj, kiuj ekfunkciis en la 50-aj jaroj, multiĝis al 3 204 dum tiuj pli ol 40 jaroj. Ili kulturis entute 9 milionojn da diplomitoj. En la lastaj jaroj multaj iliaj diplomitoj ne estis ŝatataj de la entreprenoj, kiuj bezonis labormanojn, malgraŭ ke la ŝtato respondecis pri ilia okupo, pro iliaj malnovaj studfakoj. Nun teknikaj lernejoj ekhavis novan funkcion: kulturis ne nur teknikajn laboristojn, sed ankaŭ senlaboriĝintojn. Krome, en la ĉina kamparo funkcias elementaj kaj mezaj agrikulturaj lernejoj. Antaŭe ili akceptis nur kamparanajn gefilojn el elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Kvankam ili ludis ian rolon por edukado kaj agrikultura progresado en foraj malriĉaj montregionoj, tamen ili ne liberiĝis el la tradicioj de kruda terkulturado.

Evidente, la elementa kaj mez-

grada profesia eduko ne plu taŭgis por ekonomia disvolviĝo. En 1980 la unuaj profesiaj altlernejoj kaj mezlernejoj naskiĝis kaj rapide disvolviĝis. La profesiaj mezlernejoj havas 4.31 milionojn da lernantoj kaj ĉiujare akceptas 1.8 milionojn da novaj lernantoj. La proporcio de la lernantoj de profesiaj mezlernejoj kaj tiuj de la ordinaraj havas grandan ŝanĝiĝon.

POR KONTENTIGI LA SOCIAN BEZONON

Kun disvolviĝo de la merkata



Lernantoj de la Arta Lernejo farantaj skulptaĵon el glacio

ekonomio, progreso de sciencoj kaj tekniko, pliiĝo de interŝanĝo kun aliaj landoj kaj altiĝo de la popola vivnivelo, aperis multaj nove starigitaj entreprenoj, kiuj urĝe bezonas ne nur scienc-teknikajn ekspluatantojn, sed ankaŭ alte klerigitajn laboristojn kapablajn por modernaj produktado, administrado kaj ser-

vado al la tuta socio. Ĝuste por tio, diversaj profesiaj mezlernejoj starigis jenajn studfakojn, t.e. komercaj publikaj rilatoj, komputilo-aplikado, turismo, servado por eksteraj aferoj, medikamenta negoco, dekoracia belarto, kuirarto, kosmetiko, agrikultura konstruo... Dank' al tio, kvankam la ŝtato ne plu respondecas pri laborigo de diplomitoj el tiuj lernejoj, tamen ili centprocente povas trovi okupon laŭ deziro en intensa konkurenco en la laborperajo. La lernantoj diplomigis en julio ĉiujare kaj jam en majo ili estas anticipe akceptitaj de la entreprenoj, kiuj bezonas ilin. Informiĝinte pri la socia bezono la lernejoj ĝustatempe reguligas la fakan strukturon. Antaŭ kelkaj jaroj, la Pekina Praktika Belarta Lernejo havis studfakon por modelinoj de kostumo-aĉeta gvidado, poste, rimarkinte, ke la fako malvaste uzeblas, oni ĝustatempe ĝin anstataŭigis per tiu de etiketaj modelinoj. La diplomitoj kapablas ne nur bone funkcii en publikaj aferoj, sed ankaŭ bone servi kiel modelinoj.

La profesiaj mezlernejoj aranĝas sian fakan strukturon tute laŭ la merkata bezono, tion ne povas fari la tradiciaj mezgradaj kolegioj nek altlernejoj. Por kulturis fakulojn kun multflankaj kapabloj la lernejoj ne nur funkciigas kursojn pri sociaj rilatoj, komercaj aferoj, uzo de modernaj oficaĵ instalaĵoj, sed ankaŭ in-

struas aŭto-stiradon, muzikilo-ludadon, kantadon, dancadon, kosmetikon, donaco-pakadon k.a. Tiel, ŝtataj organoj, famaj kompanioj, entreprenoj administrataj de alilandanoj konkure duntas diplomitojn el profesiaj mezlernejoj, opiniante, ke kvankam ilia teoria nivelo estas malalta ol tiu de diplomitoj el altlernejoj, tamen ili estas kapablaj en praktikado. Ili perfekte faras la laboron sur iuj postenoj, kiun ne bone faras diplomitoj el altlernejoj.

La profesiaj mezlernejoj donas grandan atenton al trejnado de teknika kapableco. Ĉiuj fakoj posedas praktikan bazon en kaj ekster la lernejo. Ilia lernotempo estas 3-jara. Dum la unuaj 2 jaroj, oni donas kulturajn kaj fakajn lecionojn; kaj plie praktikado estas farata en duono de la tempo de la fakaj lecionoj. En la 3-a jaro, la lernantoj faras praktikadon ekskluzive. Fakte, jam dum la lernado ili ek-servas al la socio. Ekz., 60-70 lernantoj en la komputila fako de la Pekina Praktika Belarta Lernejo partoprenas ĉiujare la pekinan juĝadon per komputiloj pri mezgrada ekzameno. Dum la 4-a Monda Virina Konferenco, 7-a kaj 11-a Aziaj Sportkunvenoj kaj aliaj gravaj internaciaj kongresoj, la lernantoj en fakoj de publikaj rilatoj de pekinaj profesiaj mezlernejoj servis por diversaj gravaj eksteraj aferoj, tiuj en huj-a kuirarta fako de la Nacia Profesia Mezlernejo plene montris sian lertecon kaj regalis islamanojn el diversaj lokoj de la mondo per bongustaj islamaj pladoj.

POR KE ĈIU FARIĜU KAPABLULO

En Ĉinio nemalmultaj gepatroj aranĝis por la infano jenan vivvojon: lernado en elementa lernejo, mezlernejo, kaj altlernejo por trovi bonan okupon. Sed la nuna eduka stato de Ĉinio ankoraŭ ne povas kontentigi la deziron de ĉiuj. Pro tio, profesiaj mezlernejoj multe helpas tiujn, kiuj malsukcesis en ekzamenoj por eniri en altlernejon, kiel eble plej rapide fariĝi kapablulo.

En la 18-a Azia Konkurso de

Tondfasono kaj Kosmetiko ĉina knabino Jiang Yongqing, unu el la unuaj diplomitoj de la Pekina Praktika Belarta Lernejo, gajnis ĉampionecon de ŝminkado por vespera festeno kaj 6 ĝeneralajn ĉampionecojn de la konkurso. Tio plenigis blankon de Ĉinio tiuflanke. Nuntempe ŝi laboras kaj kiel internacia komentistino kaj kiel elita instruistino en la profesia lernejo. Per si mem ŝi konigis al la lernantoj, ke ankaŭ en kosmetiko kuŝas profundaj scioj.

Por ke la lernantoj posedu plej bonan teknikon, la lernejo elspezis grandan sumon da mono por aĉeti avangardajn instalaĵojn el alia lando, starigis sian praktikan bazon, Kosmetikejon Monita, kaj dungis en- kaj eksterlandajn fakulojn. Ne-longe poste, la praktikantoj igis la kosmetikejon vaste konatan tra Pekino kaj altiris al si multajn famajn artistojn. Li Dongtian, kiu instruis en la lernejo post sia diplomitiĝo, estis invitita de televid-teatra trupo fari hararanĝon de aktoroj. De pluraj jaroj, instruistoj kaj lernantoj de tiu lernejo plurfoje akiris premiojn en gravaj konkursoj en- kaj eksterlandaj. Nuntempe, iuj diplomitoj laboras en hoteloj, aliaj mem funkciigas kosmetikejon kaj triaj lernas en Britio.

Instruisto diris, ke iuj lernantoj ne bone lernis antaŭe, kaj se ili daŭrigus sian lernadon en ordinara mezlernejo, estus malfacile por ili sukcese en ekzamenoj por eniri en altlernejon, sed en profesia supera mezlernejo ilia kapablo estis ekspluatita kaj fortigita, pro tio ili retrovis memfidon kaj havigis al si diversajn ŝancojn kaj perspektivon ne malpli bonan ol tiu de studentoj.

Laŭ politiko de la ŝtato, diplomitoj el mezlernejoj rajtas partopreni en la ekzamenoj por altlernejo, sed tiuj el la profesiaj, ne. Ili havas la rajton nur post 2-jara laborado. Ekde 1996, la ŝtato permesis al ili partopreni la ekzamenojn por eniri en koncernan profesion altlernejon tuj post kiam ili diplomiĝis. Diversaj profesiaj kaj teknikaj normalaj altlernejoj ekakceptis eminentajn lernantojn por elbaki ilin en instruis-

tojn en profesiaj mezlernejoj. En tiu jaro 21 el la 22 kandidatoj el komputila fako en la Pekina Praktika Belarta Mezlernejo sukcese eniris en profesion altlernejon post la ekzamenoj; kaj tiuj de belarta fako plejparte eniris en belartajn altlernejojn tre famajn en Ĉinio. Evidente, diplomitoj el tiaj mezlernejoj estas multe pli fortaj ol tiuj el la ordinaraj.

Kompreneble, multaj el ili partoprenas en la por-adoltaj ekzamenoj por altlernejo. Laŭ ili, por la scio-ekonomio de la 21-a jc., lernado estos dumviva tasko.

KUNE FUNKCIIGI LERNEJON

La Pekina Profesia Mezlernejo de Eksteraj Aferoj kaj la Pekina Hotelo kune funkciigas lernejon, laŭ bezono de la hotelo, kiu liveras teknikan direkton kaj praktikan lokon. Se la lernantoj estas dungitaj de la hotelo post praktikado, la lasta pagas trejnan elspezon al la lernejo. Dank' al tio, oni ne plu blinde kulturas lernantojn kaj samtempe grandigas ekonomian forton de la lernejo.

Iuj ŝtat- kaj provinc-nivelaj profesiaj mezlernejoj formiĝis el pluraj lernejoj. Ĝenerale, ili estas potencaj kaj pro kapitalo kaj pro avantaĝo. Nun, oni funkciigas lernejon ankaŭ kune kun alilandaj entreprenoj, ekz., la Pekina Lernejo por Servo al Eksteraj Aferoj kaj iu germana instituto kune funkciigas la Lernejon Ĉin-Germanio kaj reciprokas lernantojn. En la urbo Tangshan, Hebeiprovinco, estas plenumata kunlabora programo pri Edukado de Ĉinaj kaj Germanaj Kampanoj. La ĉina flanko liveras lokon kaj respondecas pri lernanto-akceptado kaj administrado, kaj la germana respondecas pri teknikaj instalaĵoj kaj instruado.

En Shaoyang, Hunan-provinco, dek profesiaj mezlernejoj kaj cent kamparaj agronomiaj teknikaj lernejoj kulturis mil scienc-teknikajn familiojn kiel ekzemplojn, kiuj gvidas kelkdek mil kamparanajn familiojn sin riĉigi kaj estas multe ŝatataj de la popolo. ■

de XIN WEN

CHEN Shuangxi estas kamparano de Queshan-gubernio, Henan-provinco. Ekster lia atendo, maje de 1998 la arbaro, laŭkontrakte kulturata de li dum 20 jaroj, estis arbitre okupita de vilaĝaj kadroj kun preteksto konstrui fabrikan. Antaŭ tio Chen kaj lia familio jam investis pli ol 400 000 juanojn por la forstumado. La monsumo estis ŝparita de lia tuta familio en multaj jaroj.

Ĝuste kiam Chen sin preparis por fari akuzon en la gubernia juĝejo, la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio publikigis novan "Agraran Leĝon" kaj dank' al tio la arbaro revenis al sia mastro.

La nova leĝo montras, ke kontrakto pri terkulturado validas 30 jarojn kaj la rajtoj de la kamparanoj pri terkulturado estas defendataj de la leĝo.

Nova agrara leĝo

Praktiki laŭkontraktan respondecan produktan sistemon ellaboritan en 1978 estas unu el la gravaj enhavoj pri la kampara ekonomia reformado. La kontraktoj faritaj tiam validis jam 20 jarojn. Dum tiuj 20 jaroj la kamparanoj donis kontingenton de siaj rikoltoj al la ŝtato kaj proprigis la ceteran. Tio rompita la malnovan sistemon de egalisma distribuado kaj iagrade levis la kamparanan labor-entuziasmon. Ĉar iuj kamparanoj maltrankvilis pri eventuala ŝanĝiĝo de la politiko, tial ili ne volis elspezi multe por kampo-konstruado. Nun la nova leĝo difinis, ke la politiko ne ŝanĝiĝos en la venontaj 30 ja-

roj, tial la kamparanoj povas defendi siajn rajtojn per la leĝo. Oni diris: "Nun ni komplete liberiĝis el maltrankvilo."

Krome, la nova agrara leĝo defendas la rajtojn de la kamparanoj en multaj flankoj. En la lastaj jaroj pro lokaj kaj portempaj interesoj iuj lokaj registaroj kontraŭleĝe vendis teron kaj multe reduktis la agraron. La nova agrara leĝo difinis, ke nur la provincaj kaj pli altnivelaĵaj popolaj registaroj rajtas ŝanĝi agroj en konstruejojn laŭ la ĝenerala loka programo, por ke oni uzu kiel eble plej malmulte da agroj por konstrua celo. ■

Batalo kontraŭ kontrabando

de JI SI

ANTAŬ nelonge la Centra Televizio de Ĉinio, kiu havas 700 milionojn da rigardantoj, telesendis televidan filmon pri batalo kontraŭ kontrabando, kio vekis grandan atenton ĉe la publiko. Sur ekrano oni vidis la animskuan batalon kontraŭ kontrabandistoj kaj informiĝis, ke kontrabandaĵoj senĉese invadas la ĉinan merkaton kaj multe damaĝas la socion.

Fakte kontrabando estas kaj konata kaj fremda por ĉinoj. Oni aĉetas kontrabandaĵojn sen scii la kanalon de la varoj kaj nur tre

malmultaj scias pri kontrabando.

Komence de la 80-aj jaroj pro vigliĝo de ekstera komerco kontrabando aperis unue en la regionoj ĉe la orienta marbordo de Ĉinio. Tiam oni kontrabandis ĉefe elektronikajn brakhorloĝojn, ŝtofojn, cigaredojn kaj hejmajn elektrajn aparatojn en malgranda kvanto. En la 90-aj jaroj plimultiĝis tiaj aferoj kaj multe kreskis monsumoj de la kontrabandaĵoj. Tiam la kontrabandoj faritaj de entreprenoj konsistigas pli ol 80% de la traktitaj kazoj. Kontrabandaĵoj estas ne nur cigaredoj, aŭtomobiloj, kemiindustriaj materialoj, tekstilaĵoj kaj ŝtalaĵoj, sed ankaŭ petrolo kaj

kuir-oleo. Oni kontrabandas ankaŭ leĝe malpermesitajn pafilojn, toksikojn, nekvarantenigitajn fruktojn kaj piratajn diskojn. Ekster la teritorio de Ĉinio nun aktivadas profesiaj kontrabandaj bandoj. Ankaŭ iuj enlandaj entreprenoj pli kaj pli multe kontrabandas por eviti doganon.

Laŭ statistiko, de januaro ĝis oktobro 1998 la ĉinaj doganoj malkovris entute 5 659 kontrabandojn kun valoro de 9.52 miliardoj da juanoj.

Kontrabando riĉigis malmultajn homojn, sed kaŭzis depresion de iuj entreprenoj. Ekz. pro kontrabando la aŭtomobila industrio ĉiujare suferis perdon de miliar-



Kontraŭkontrabanda ŝipo de la ĉina dogano patrolanta surmare

doj da juanoj. Iuj fabrikoj devigite reduktis aŭ ĉesigis sian produktadon pro invado de kontrabanditaj aŭtoj en la merkaton. En la meza periodo de la 90-aj jaroj pro kontrabando iuj sukeraj fabrikoj en nordorienta Ĉinio havis grandan malfacilon en vendo de siaj varoj kaj la kamparanoj ne plu sin okupis pri tradicia kulturado de beto, grava materialo de sukero.

Ĉinio, kiel disvolviĝanta lando, povas kaj devas protekti sian nacian industrion. Tiukampe do-

gano ludas gravan rolon. Pro tio la ŝtato multe impostas ne nur cigaredojn kaj vinon, sed ankaŭ aŭtomobilojn, elektronikajn aparatojn kaj hejmajn elektrajn aparatojn.

Nun en bona kunlaboro la doganoj kaj industriaj-komercaj administracioj plifortigis kontraŭkontrabandan laboron sur maro, ĉe marbordo kaj en haveno kaj merkato, severe punas kontrabandistojn kaj jam akiris sukcesojn. Dank' al ilia efika laboro la prezo de iuj specoj de petrolo, devigite

mallevita antaŭe pro kontrabando, nun kreskis kaj produktoj de iuj rafinejoj denove akiris grandan debiton. Tamen pro diferenco de la prezoj en- kaj eksterlandaj la batalo kontraŭ kontrabando restas longtempa kaj peniga. Koncernaj oficistoj diris, ke la Ĝenerala Dogana Administracio de Ĉinio jam ellaboris novan sistemon por fari efikan, kompletan kaj ĉiuhoran preventon kaj kontrolon de kaj batalon kontraŭ kontrabando kaj la ŝtato fondis kontraŭkontrabandan policon. ■

KURANTAJ AFEROJ

● Laŭ statistiko, la produktokvanto de fridujoj, lavmaŝinoj, elektraj ventumiloj, gladiloj kaj marmitoj, bicikloj, poragrikultura plasta membrano, hejmaj ceramikaĵoj kaj ledaj ŝuoj de Ĉinio okupas la unuan lokon en la mondo; tiu de biero, sinteza lesivo kaj salo — la duan lokon; kaj tiu de papero, kartono, sukero, klimatiziloj kaj brakhorloĝoj — la trian lokon. Nun Ĉinio produktas 260 000 specojn da malpez-industriaj varoj kaj ĉiujare liveras al la merkato 10 milojn da novspecaj varoj.

● Kvankam Ĉinio suferis de eksterordinara inundo en 1998, tamen ĝia totala grena produktokvanto atingis 490 milionojn da tunoj, preskaŭ egale al tiu en 1997.

● La unua ĉina novjarcenta aŭtomobilo kun marko Buick estis farita de la Universala Aŭtokompanio kune investita de Ĉinio kaj Usono. Tiu ĉi estas la plej granda kompanio de aŭtoj investita de Ĉinio kaj alia lando, kun jara produktokvanto de 100 000 aŭtoj. Pli ol 40% de ĝiaj pecoj estis produktitaj de Ĉinio.

● Nun Ĉinio penas por stariĝi universalan teran reg-reton por doni ĝustajn veterinformojn de la spaco de kelkdek ĝis mil kilometroj super la terglobo. Tio servos al lanĉo de satelito, navigado de kosmoŝipo, irado de kosmonaŭtoj en la spaco kaj pilotado de aviadilo kaj ŝipo. La reto faros prognozojn pri la suna ŝtormo, ter-magneta ŝtormo kaj elektromagneta radiado por preventi misfunkcion kaj falon de satelitoj, malĝustan lokalizon de pilotado, ĉeson de komunikado ktp.

LI MALGRASIĜIS PRO NOVA ŜAKO

Sinjoro Verda Dian inventis ĉinan Esperantan ŝakon, kiu bazas sin sur tradicia ĉina ŝako kaj asimilas ludmanieron de internacie populara ŝako. Nun la nova ŝako havas amantojn ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj.

de XIANG HONG

EN la okuloj de ordinaruloj li estas iom stranga. Ni rigardu lian aspekton. Li estas mezstatura kaj grizhara, kaj sur lia sulka vizaĝo pendas grandaj okulvitroj. Sur stratoj de Chengdu lia ĉiam portata nigra sako ebligas al vi tuj rekoni lin en la moviĝanta homamaso. Sur la sako estas presita ŝakskatolo kun vortoj "ĉina Esperanta ŝako". Se iu scivoleme demandas lin, kio estas ĉina Esperanta ŝako, liaj profundaj okuloj tuj heliĝas kaj li ekrekondas ĝin. Se li renkontas iun interesiĝantan pri lia nova ludo, ili surloke ekludas.

Li havas strangan nomon "Verda Dian", kiu estas unu el liaj plumnomoj. Antaŭ la emeritiĝo li estis laboristo de elektraparata fabriko de Chengdu. Dian (elektro) montras lian profesion kaj esperon, ke li vivos energie kaj vikle kiel elektro. Verda simbolas Esperanton, ĉar li estas es-

perantisto. Li uzas Esperanton por disvastigi la novan ŝakon. Malmultaj homoj scias kaj mencias lian originan nomon Wang Xinqing donitan de lia patro, kiam li naskiĝis en 1940. Lia origina nomo entenas la esperon de lia patro, ke li fariĝos promesplena junulo en la nova epoko. Tiusence Verda Dian ne vanigis la esperon



Ludo de "ĉina Esperanta ŝako"





S-ro Verda Dian (dekstre) intervjuata

de sia patro kaj elektis reformadon de ĉina ŝako kiel sian amatoran karieron.

“Li ne bedaŭras malgrasiĝon pro la kariero,” tio estas ĝusta juĝo pri Verda Dian kaj lia ŝako. Li diris, ke en sia juneco li tre interesiĝis pri nova ludo de tradicia ŝako kaj poste klopodis por disvastigi la novan ŝakon.

Verda Dian tre ŝatis ĉinan ŝakon jam en la infaneco. Kiam li iom post iom spertiĝis, li malkontentiĝis pri la tradicia ludo: Kial “reĝo” ne povas eliri el sia palaco kaj gvidi la “soldatojn”? Kial la “soldatoj” povas nur antaŭeniri, sed ne malantaŭeniri? Kun la demandoj li energie studis

la antikvan ĉinan libron “Batalarto de militsciencisto Sunzi” kaj la regulojn de la internacie populara ŝako, kaj post 30 jaroj, en 1993, li publikigis projekton de nova ĉina Esperanta ŝako, kiu similas al la tradicia ĉina ŝako. La ludo estas pli libera kaj sur la ŝakpecoj, krom ĉina ideogramo, estas ankaŭ ĉina fonetika transskribo kaj Esperanta nomo. Laŭ la novaj reguloj de Verda Dian “ĉevaloj” povas paŝi rekte kaj oblikve kaj transiri alian blokantan ŝakpecon, “ĉefministroj” povas batali trans la rivero, kaj “soldatoj” povas moviĝi ĉien. “Reĝoj” de la du flankoj povas eliri el sia palaco kaj stari vizaĝon kontraŭ

vizaĝo.

Por disvastigi la novan ŝakon, Verda Dian dediĉis grandan energion kaj pagis multe. Kompreneble, li konas multajn ŝakamantojn. Komence, li sola rekomendis la ŝakon al loĝantoj de Chengdu kun granda malfacilo. Kaj nun la nigra sako kun ŝaktabulo ĉiam portata de li estas lia registrita marko. La novaj amikoj fariĝis fervoraj propagandantoj de lia ŝako. La gvidantoj kaj kolegoj de lia fabriko donis al li grandan helpon. La fabriko de ĉina ŝako de Chengdu kaj la Chengdu-a Esperanto-Asocio faris kontrakton pri produktado de la nova ŝako. Laŭ nekompleta statistiko, nun pli ol 10 000 loĝantoj de Chengdu scipovas ludi la novan ŝakon, kaj konkursoj de rapidŝako kaj nova ŝako subvenciita de iu ĵurnala reklama kompanio jam okazis po 4 fojojn. La nova ŝako ne nur estas akceptita de ĉinoj, sed ankaŭ vojaĝis en Eŭropo kaj Japanio dank’ al Esperanto. Pli ol 40 eksterlandaj amaskomunikiloj raportis pri Verda Dian kaj lia ŝako. Verda Dian kaj liaj ŝakamantoj fondis preparan grupon de la Asocio de Ĉina Esperanta Ŝako kaj presis cirkulerojn kaj periodaĵon per sia propra mono. Verda Dian tiel absorbiĝis en sia ŝako, ke li forgesis, kie kaj kiam li perdis 9 fotografilojn. Li vivas en soleco, post kiam lia edzino ne toleris lin kaj forlasis lin. Malgraŭ tio, lin konsolas la komentario de la ŝakamantoj: “La nova ŝako estas pli fleksebla kaj amuza ol la tradicia.” Ankaŭ la prezidanto de la Sichuan-a Sportsciencia Instituto diris: “La nova ideo de la nova ŝako indas studon.”

Verda Dian resumas: “Mi ĉiam havas la devizon kuraĝe fantazii. Mi tiel faris, kaj tio estas sukceso. ■

(Adreso: Verda Dian, Xuguang Dianqichang, CN-610083 Chengdu, Sichuan, Ĉinio)

Nekrologo

S-ro Dai Song'en (1944-1999), komitatano de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), ĝenerala sekretario de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) de UEA, ĉefdelegito de UEA en Ĉinio, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), vicĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio" (EPĈ) kaj ĉefredaktoro de la Ĉina Esperanto-Eldonejo (ĈEE), forpasis 55-jara en Pekino la 16-an de januaro 1999 pro kormalsano.

Dai Song'en esperantistiĝis en 1964. Post kiam li finis decembre de 1965 la Esperantan kurson de la fremdlingva fakultato de la Pekina Radiodisaŭdiga Instituto, li eklaboris en la Esperanto-sekcio de Radio Pekino (nun Ĉina Radio Internacia) kiel parolisto. De 1981 li servis en la Ĉina Esperanto-Ligo. De 1991 li laboris ankaŭ por la redakcio de "El Popola Ĉinio". Li multfoje partoprenis organizadon de grandaj Esperantaj renkontiĝoj, li faris grandan kontribuon al la Esperanto-movado. Lia forpaso estas granda perdo por la movado. Ni tre doloras kaj funebras pro li.



Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Ĉina Esperanto-Eldonejo

Por ĉiam juna Dai

de TAN XIUZHU*

KARAJ legantoj, kiam vi malfermis la unuan numeron de "El Popola Ĉinio" kaj legis la "Novjaran Mesaĝon" de ĝia vicĉefredaktoro Dai Song'en, kun koraj bondeziroj por via sano kaj feliĉo, vi neniel povas imagi, ke li jam ne plu estas inter ni. La 16-an de januaro la Fatalo forrabis lian nur 55-jaran vivon. Li foriris tre abrupte, tre haste, kun neniu antaŭsigno, tial lia forpaso forte ŝokis kaj batis nin, ke mia cerbo eĉ ĉesis pensi dum momentoj. Nun kiam mi levas plumon por skribi ion memore al li, mi ankoraŭ ne povas kredi la fakton pri lia foriro. Antaŭ miaj okuloj de tempo al tempo aperas lia vigla figuro kun mieno jen gaja, jen serioza, jen petola. Tamen, en la granda malĝojo ni povus iom konsoliĝi per motivo,

ke li foriris sen ajna doloro, eĉ en bona humoro; pli grave, mi opinias, ke li estis feliĉulo en la verda ĝardeno, kiun li plenenergie kulturis dum la tuta vivo, kun riĉa rikolto.

Septembre de 1964 li komencis lerni nian lingvon en la Esperanta kurso gvidata de profesoro Wei Yuanshu en la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto. Du monatojn poste li kaj mi fariĝis kunlernantoj de Esperanta kurso sub la gvido de famaj ĉinaj Esperanto-veteranoj Venlo Fon kaj Zensto en la Pekina Radiodisaŭdiga Instituto. La tagoj de la Esperanto-lernado por Dai estis agrablaj kaj feliĉaj. Pro sia spriteco, saĝeco kaj diligenteco li estis tre ŝatata de la instruistoj, kaj plie li enamiĝis al fraŭlino Xue Meixian (Roza), kiu poste fariĝis lia versence samideana edzino kaj akompanis lin ĝis lia lasta momento. Post la diplomitiĝo de la kurso li elektiĝis kiel profesia parolisto kaj tradukisto

en la Esperanta Sekcio de Radio Pekino (Ĉina Radio Internacia) pro sia bona lernado, ĝusta kaj bela elparolo de Esperanto kaj naturdotita basvoĉo, kaj tiel komenciĝis lia Esperanta kariero.

Krom labori kiel parolisto en Radio Pekino, li poste redaktis la organon de la Ĉina Esperanto-Ligo "La Mondo", instruis en la Esperanta kurso por altlernejaj instruistoj, kunorganizis multajn internaciajn Esperantajn kunvenojn kaj agadojn, sin okupis pri redaktado, eldonado kaj distribuado de ĉinaj Esperantaj gazetoj kaj libroj. Mi povas diri, ke liaj laboroj ampleksis preskaŭ ĉiujn flankojn de la ĉina Esperanto-movado. Ĉu li estis ordinara aganto en la ĉina verdujo, ĉu poste li gvide funkciis kiel ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, vicĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio" kaj ĉefredaktoro de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, li bone

plenumis ĉiujn komisiitajn taskojn, kun alta fervoro, klara menso kaj forta sento pri respondeco. Li faris grandan kontribuon al la ĉina Esperanto-movado, kaj pro tio ĉinaj esperantistoj karmemoros lin kun kora dankemo.

Parolante pri lia kontribuo al la Esperanta movado, mi volas aparte menciĝi lian gravan rolon en sukcesigo de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en 1986. Dai partoprenis la tutan proceson de la preparado kaj organizado de la Kongreso kaj faris amasegon da detalaj kaj komplikaj laboroj. Kompare kun aliaj universalsalaj kongresoj, la Pekina UK ne estis perfekta. Alte taksante ĝian valoron kaj signifon, oni havis ankaŭ multajn plendojn pri ĝi, pro kiuj mi, kiel unu el la LKK-anoj, kiu respondecis pri la kongresaj kurieroj, sentas eĉ nun grandan

diri nenion, ĉar mi ne volis plu ĝeni lin. Kvankam la Pekina UK havis multajn mankojn, tamen ĝi, kiel la plej granda esperantista renkontiĝo ekster Eŭropo kaj unua UK okazinta en Ĉinio, skribis brilan paĝon en la historio de la Esperantomovado ĉina kaj internacia. La klopodoj de Dai por la Kongreso kaj montritaj kapabloj trovis rekonon de la publiko, kaj rekompence li estis elektita kiel komitatano de UEA. La Kongreso multe spertigis Dai pri organizado de internaciaj Esperantaj agadoj.

Post tio li ludis ŝlosilan rolon en sukcesa okazigo de la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao kaj la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Sanhajo.

Ĉi tie por mi ne necesus pli multe prezenti Dai, ĉar li ne estis fremda por vi. Vi ne nur legis lin en artikoloj de EPĈ, pli multaj el vi ankaŭ

konatiĝis kun li vid-al-vide en diversaj Esperantaj renkontiĝoj. Supozeble, ĝis nun nuniu el la ĉinaj esperantistoj tiel multe montriĝis mondscale en movadaj agadoj kiel Dai. Krome li volontulis unu jaron ekde aŭgusto de 1982 en la centra oficejo de UEA. Tio ne nur havigis al li bonan konon pri la kerno de nia movado, sed ankaŭ ebligis al li vaste kontaktiĝi kaj amikiĝi kun diverslandaj Esperantaj organizaĵoj kaj aktivuloj kaj bone kunlabori kun ili. Liaj amikoj troviĝis tra la mondo, kiuj verŝis al li abundon da amo kaj konfido, ĉu li ne sentis sin fiera kaj feliĉa pro tio!



Dai Song'en (maldekstre en la antaŭa vico) dum la Montpeliera UK

Aŭguste de la pasinta jaro li lastfoje sin montris en la Montpeliera UK ja por adiaŭi niajn karajn legantojn kaj siajn amikojn, kvankam nek li, nek vi antaŭvidis tion.

Mi kaj miaj kolegoj en la redakcio kutime nomis Dai Song'en "Xiao Dai". En la ĉina lingvo "Xiao" estas epiteto antaŭ la nomo, kiu signifas "malgranda aŭ juna". Efektive Dai estis ankoraŭ tre juna. Li estis tro juna por forlasi sian familion, kiu bezonas lian amon de edzo, patro kaj filo. Li estis tro juna por forlasi nian movadon, kiu bezonas lian talenton, sperton kaj energion. En Ĉinio funebrado de blankharuloj (maljunaj gepatroj aŭ geavoj) al nigraharuloj (junaj gefiloj aŭ genepoj) estas rigardata kiel plej granda malfeliĉo, kaj la forpaso de Dai surscenigis ĝuste tian tragedion, ĉar li forlasis ankaŭ sian 92-jaran patrinon, kiu bezonas lian vivtenon. En tiu trista tempo mi kaj liaj aliaj kolegoj en la redakcio kaj ĉinaj esperantistoj volontas dividi kun lia familio la malfeliĉon, samtempe ni bezonas subtenon, helpon kaj kuraĝigon de niaj karaj legantoj por ke ni havu forton daŭrigi lian kaj ankaŭ nian komunan verdan aferon.

Por ĉiam juna restos Dai en nia koro. ■

* Prezidantino de ĈEL, eksa vicĉefredaktoro de EPĈ.



Dai Song'en, lia edzino kaj ilia filino

bedaŭron. Sed niaj afablaj legantoj kaj ĉeestintoj de la Pekina UK certe scias, ke Ĉinio estas disvolviĝanta lando, kaj la 71-a UK estis la plej granda internacia konferenco siatempe okazinta en Ĉinio. Oni povas imagi kiom da malfaciloj ni renkontis dum la okazigo de la Kongreso pro limigo de la materiaj kaj homaj fortoj, precipe pro manko de sperto. Kiel sekretario de LKK, Dai portis sur si multe pli grandan ŝarĝon kaj respondecon ol la aliaj. Foje en la kongresejo mi iris al li por peti helpon. Sed kiam mi vidis lian vizaĝon lacegan de zorgoj kaj laboroj, mi povis

40-jariĝo de Esperanto-redakcio de Pola Radio

de BARBARA PIETRZAK

LA 4-an de aprilo 1959, kiam aŭdiĝis la unua duonhora E-elsendo el Varsovio kaj ektondris unu el la plej popularaj voĉoj de Pola Radio, tiu de Piotr Rowinski: "Parolas Varsovio — naskiĝurbo de Esperanto", la esperantlingvaj elsendoj ne estis novaĵo. Jam de la 20-aj jaroj la E-movado kutimiĝis al siaj, t.e. esperantlingvaj elsendoj el diversaj radiostacioj — inter kiuj iuj ricevis apartan renomon. Oni bone konis ankaŭ esperantlingvajn programojn el Varsovio.

Kaj tamen la 4-an de aprilo 1959 okazis io eksterordinara. La unuan fojon la Esperantlingvaj elsendoj estis konceptitaj kiel programoj ĉiutagaj. Ili ricevis la saman rangon, kiel la ceteraj alilingvaj elsendoj en la Poreksterlanda Programo de Pola Radio. En Pola Radio mem okazis E-kursoj por profesiaj parolitoj, por radiaj sonteknikistoj. Tamen ne ekzistis tiam pretaj imitmodeloj de ĵurnalista laboro, necesis ilin pene kaj kree evoluigi. Kaj tio vere sukcesis. La altan profesion nivelon de la laborantaj en la E-redakcio redaktoroj kaj ĵurnalistoj pruvis interalie la fakto, ke iuj el inter niaj kolegoj dum iu periodo laboris ankaŭ en aliaj redakcioj. Ekzemple la unua profesia redaktoro de la varsoviaj E-elsendoj, Jerzy Uspienski fariĝis la kreinto de multaj interesaj programoj en la Literatura Redakcio de Pola Radio. La nuna estro de la varsoviaj E-elsendoj, Andrzej Pettyn, dum dekelkaj jaroj estris la Finan Redakcion de Pola Radio. La

altan nivelon de la radiolaboro de la redakcia stabo konfirmis pluraj premioj profesiaj kaj movadaj. Ĉi-lastaj estis aparte kortuŝaj, komencante de la unua, ricevita dum la Viena UK en 1970, en la formo de unu el la plej unuaj PIV-ekzempleroj, kaj finante per la Premio Deguchi ricevita en 1993. Ili konfirmis la gravan rolon de la varsoviaj E-elsendoj por la esperantlingva komunumo, por la E-movado.

La tutan tempon nia redakcia anaro laboris entuziasme, eĉ tiam, kiam la etoso en la Poreksterlanda Programo de Pola Radio ne estis tre favora por niaj esperantlingvaj elsendoj. Kompreneble dum tiuj jaroj ŝanĝiĝis ankaŭ la konsisto de la redakcio, kiu aktuale laboras en modesta kolektivo konsistanta el Andrzej Pettyn, Anna Limont kaj Barbara Pietrzak, kunlaboro kun aliaj Esperantoredaktoroj kaj praktikantoj. Sed ne eblas okaze de la 40-jara jubileo ne mencii la nomojn de aliaj meritiĝintaj por la redakcio kolegoj, ĉefloke la ne plu vivanta Jerzy Grum. Ne eblas preterlasi la nomojn de la jam emeritiĝintaj, sed kunlaborantaj pli aŭ malpli ofte Jan Klimek kaj Milada Szwedo, aŭ de laborintaj nur dum kelka tempo Ewa Krach kaj pli frue Mariusz Dastyh.

Ekde la komenco la programo de E-redakcio de Pola Radio vaste prezentis Pollandon kaj ĝiajn problemojn al eksterlandaj aŭskultantoj. Ekde la unua elsendo la pro-

gramoj prezentis ankaŭ la aferojn de la E-movado, kvankam ilia kvanto poiome signife kreskis. Entute en la daŭro de la pasintaj 40 jaroj niaj elsendoj multe evoluis laŭ ĉiuj vidpunktoj. Plivastiĝis kaj pliintimiĝis la kontaktoj kaj kunlaboro kun la geaŭskultantoj, kiuj ĉiam fundamentis la laboron de la redak-



En elsenda studio

cio. Ni ĝojas pri ĉiu nova aŭskultanto, ĉiu nova radioamiko. Tamen neniel ni forgesas tiujn, kiuj fidelas al niaj elsendoj ekde la unua en 1959, al kiu apartenas inter aliaj Gunther Becker aŭ Josef Kondor el Germanio. Dum la 40-jara historio de la varsoviaj E-elsendoj firmiĝis la kunlaboro kun E-organizaĵoj, kun la alilandaj radiostacioj emisantaj en Esperanto, sekve kun lokaj radioelsendoj en aliaj landoj. Tutaparte ĉiu UK estis la okazo por amika kaj kolegeca flego de kontaktoj kun redaktoroj de la Esperantlingvaj Elsendoj de Pekina Radio, kiuj kreiĝinte en la 60-aj jaroj ankaŭ spertis la kunlaborem de la varsoviaj kolegoj. Mi mem ankaŭ neniam forgesos miajn unuajn tre korajn kaj amikajn kontaktojn

kun la ĉinaj kolegoj dum la buda-peŝta kaj sekve augsburga UK-oj, ne laste ankaŭ dum la montpeliera UK. Restas por mi neforgeseblaj kaj tre valoraj niaj renkontiĝoj kun komunaj aŭskultantoj de la varsovia kaj de la pekina radioelsendoj. Multe ĝojigis nin ĉiujn kaj riĉigis la staĝo, kiun antaŭ kelkaj jaroj en la varsovia E-redakcio faris gekolegoj de Pekina Radio. Ni firme kredas, ke ankaŭ en ilia memoro la varsovia staĝo restis neforgesebla.

Dum ĉiuj pasintaj 40 jaroj la varsoviaj E-elsendoj rolis kiel la ĉiutaga vivanta lingvo-medio por esperantistoj vivantaj dise kaj kelkfoje eĉ izolite, kontribuante al altigado de la parola lingvokulturo de Esperanto inter diverslandaj lingvoadeptoj. Ne malofte — danke al niaj geaŭskultantoj — la elsendoj en la formo de rekta satelita emisio, en la formo de kaseda surbendigo gastis kaj gastas dum esperantistaj kunvenoj, konferencoj, servas dum la lingvoinstruado.

La lastaj jaroj estas la periodo de grandaj kaj gravaj ŝanĝoj en la tuta sistemo de la amaskomunikado. E-elsendoj de Pola Radio sekvis tiujn ŝanĝojn avantaĝe por siaj geaŭskultantoj. Antaŭ ĉirkaŭ kvin jaroj ankaŭ la E-elsendoj komencis esti emisiataj persatelite, kio kaŭzis kreiĝon de vera klubo de la persatelitaj aŭskultantoj de la varsoviaj elsendoj. De pli ol unu jaro la 4-minuta parto de la varsovia E-elsendo atingas aŭskultantojn en ĉiuj mondpartoj, danke al la reta sistemo (Real Audio). La pasintjara dumkongresa kaj prikongresa informbulteno el Montpeliero, Francio, elvokis entuziasmon inter la ekstereŭropaj aŭskultantoj de niaj elsendoj. La reta emisiado kaŭzis ĝuste, ke efektive la elsendoj de Pola Radio ekhavis ankaŭ la globskalan dimension. Tio estu bona aŭguro por la laŭvicaj laborjaroj de la 40-jara E-redakcio de Pola Radio, en kiuj la parolata Internacia Lingvo el Varsovio estu la okazo ĉiutge sperti al ĉiu, deziranta tion esperantisto, propran lingvoidentecon. ■



La aŭtoro

Poemoj

de DMITRIJ CIBULEVSKIJ (Ukrainio)

Amon for...

Vi certe scias —
amas mi
Vin ĝis ebri', ĝis freneziĝo.
Sed jam ne povas amo ĉi
Al ni alporti la feliĉon.

La sorto estas —
amon for
El mia koro por ĉiame
Kun sang' forigi. La dolor'
Nun anstataŭ la flamon.

XI. 1981

Flaviĝas folioj kaj falas surteren,
Angoras koro mia.
Jam baldaŭ vokos min la infero, —
Trankvilos animo via.

Pekojn miajn elbatos diabloj
Dum vin atingos forgeso.
"Ne vane mi vivis kiel en fablo" —
Mi ripetados senĉese.

Se havus eblecon mi vivon duan
Ree pasigi surtere,
Pasigus mi ĝin sama gajan kaj bruon.
Tion mi diras sincere.

IX. 1992

Aer' malhelas pro nebulo,
Interne koro premas sin.
Kaj vagas mi kiel fremdulo —
Vin rememoras kun obstin'.

Ĉu vanaj estis renkontiĝoj
Kun vi, amata junulin'?
Ĉu vi forgesis pri feliĉo,
Pri ĝoj', pri amo, pri destin'?

Ĉu nure restis rememoroj
Pri viv' pasinta, pri la am'?
Ĉu jam neniam en la koro
Ekbrulos juna, arda flam'?

Ĉu proksimiĝas aŭtuno
De l' vivo? Ĉu jam venis temp'
Ke mian korpon nur la suno
Varmigu, — ne knabina help'?

Ne, certe kredos mi neniam,
Ke pasis tempo de l' junec',
Ke de l' animo varmon mian
Ne plu bezonos inbelec'.

IX. 1992

Entrajnaj meditoj

Malgraŭ sufiĉa aĝo,
Mi preferas la vojaĝon
Perpiede, per boat'

Tra riveroj kun kantad',
Grimpi montojn, skii vintre —
Estu nur ne tro ridinde, —
Per ĉeval' tra intermont'
Por rigardi en la mond'
Larĝriverojn, bluajn marojn,
Vastajn valojn, verdarbarojn,
Birdojn, bestojn ne post baroj,
Forajn lokojn, belajn, karajn,
Kaj por estu post ripoz',
Mi pli freŝa, ol la roz'.
Por dum jar' proksimiĝanta
Al la lingvo Esperanto
Estu pli utila mi
En amika kompani'.
Pli preferas, tamen, vere,
Plej konfide, plej sincere
Mi vojaĝon per bicikl'
(Vi atentu — ne vehikl').
Oportune selon sidas,
Per stiril' la vojon gvidas,
La pedalojn forte premas,
Kapon, tamen, firme tenas
Kaj fieras pro la sent' —
Ne superos vin la vent'.
Longdistancon dum la tago
Vi trakuras, jes, senpage
Laŭ vojoj kaj sen voj'.
Kaj atingos vin la ĝoj':
Ne superos vin malsano,
Sentos vi kiel infano.
Kaj jam poste dum renkont'
Nepre sekvos belrakont'.

VI. 1992

“Panjo!”

de YANG LIHONG

KIAM mi fariĝis instruistino, mi gvidis la unuan klason en elementa lernejo. En la klaso estis ses-jara knabino, kiu nomiĝas Zhang Jin, malgrasa kiel malsatulo. Ĉar ŝi longtempe vivis sub alies tegmento, ŝi havis enfermiĝeman karakteron, rigardis la ĉirkaŭaĵon ĉiam kun grandaj okuloj kaj ne emis paroli kun aliaj. Neniu atentis ŝian ekziston, verŝajne ŝi estis malgrava en la klaso.

Venis la Instruista Tago. Tiam la Instruista Tago ne estis tiel atentata kiel nun. Eĉ mi mem ne sentis ĝin diferenca. Post la lecionoj mi estis okupita de kontrolado de la hejmtaskoj. Zhang Jin senbrue iris al mi kaj demandis: “Instruistino Yang, ĉu mi povas fari al vi donacojn?” “Dankon! Prezentu ilin al mi,” respondis mi. “Mi havas du donacojn, unu videblan kaj la alian nevideblan.” Mi ĝoje rigardis ŝin, kiu etendis la manon al mi de post la dorso. Ŝi tenis ŝvelan koverton kun olemakuloj. Rigardante



ŝian ekscititan vizaĝon, mi akceptis la koverton kaj trovis en ĝi gluecizajn kuketojn. Mi ĝoje diris: “Koran dankon, mi tre ŝatas ilin. Kio la alia?” Ŝi stariĝis sur la piedpintoj, faris la manojn kiel trumpeteto ĉe mia orelo kaj flustris: “Ĉu

mi povas nomi vin panjo?” Tuj la vortoj tuŝis min, kaj miaj okuloj malsekiĝis. Mi kapjesis forte, kaj ŝi mallaŭte vokis ĉe mia orelo: “Panjo!”

Tiam mi ĵus atingis 19 jarojn kaj ankoraŭ ne spertis amaferon. ■

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	kHz
11:00-11:30	Japanio, Koreio	41,84	7170
		31,46	9535
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25,86	11600
		25,34	11840
20:00-20:30	Eŭropo	40,51	7405
		30,11	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30,43	6860
		43,17	6950

ĈINIO

● Je la 20-a de dec. 1998 la Hubei-a E-Asocio kaj la Xinxiang-a E-Asocio (Henan-provinco) respektive okazigis jarkunvenon kaj celebris la 139-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Je la 12-a de dec. 1998, en Ŝanhajo ankaŭ E-



Ŝanhajaj E-studgrupanoj

studgrupo kunvenis por la sama festado. (Peng Zhengming, Han Daozhu kaj Lu Wenfang)

● La societo "Amikoj de Esperanto", Ĉina Esperanto-Ligo kaj aliaj organizoj kune aperigis Esperantan filatelaĵon por la 100-a datreveno de la naskiĝo de fama ĉina verkisto Zheng Zhenduo (1898-1958), kiu fervore subtenis Esperanton. Okaze de la 50-jara jubileo de Esperanto li verkis la artikolon "Esperanta Movado", en kiu li skribis: "Plejparto de la esperantistoj apartenas al subpremataj nacioj kaj kompatas la subprematajn naciojn. Tiupunkte la lernado de Esperanto estas pli signifa ol tiu de aliaj lingvoj." (Qin Kaiji)

● En la Novjara Tago de 1999 la inaŭguro de "Transjarcenta vojaĝo — piediri tra la nova eŭrazia ponto", organizita de la Huangshi-a E-Asocio de Hubei-provinco, okazis ĉe la orienta pontkapo — Lianyungang. (Zhang Minniu)

KROATIO

● Pro alveno de la Papo al

Kroatio (2-4a de oktobro) KEU okazigis la ago-tagon tri tagojn pli frue. Ankaŭ ĉi-jare oni agotagis en la ĉefa zagreba ĉiovendejo "NAMA". Ĉe la budo, la vizitantoj povis foliumi la eldonaĵojn por junaj lernemuloj. La plej junaj KEU-anoj prezentiĝis per la fotoj kaj internaciaj korespondaĵoj. La

vizitantoj h a v i s e b l e c o n s p e k t i " M a z i " kaj kelkajn aliajn E-video-bendojn. Pri la ago-tago i n f o r m i s k e l k a j taggazetoj (unu eĉ aperigis la foton) kaj

radioj.

(Kroata Esperantista Unuiĝo)

SLOVENIO

● La 17-an de oktobro 1998 okazis en Maribor, Slovenio, la Dua Internacia Video-filma Festivalo en Esperanto, kiun organizis Esperanto-Societo de Maribor kaj Inter-Kulturo. Al la aranĝo

v e n i s o r g a n i z i t a j grupoj el Tries-to kaj Zagreb-o. La prezenti-tajn filmojn prijuĝis

8-membra internacia ĵurio el Italio, Aŭstrio, Kroatio kaj Slovenio. En kategorio "Artaj filmoj" la premion gajnis "La eta knabino" de svisa aŭtoro Samir. Por dokumenta filmo la premion ricevis "Tagĵurnaloj de la Internacia Junu-

lara Kongreso en Rijeka", farita de la junulara filmgrupo de Kroatia Esperanta Junulara Asocio. La tria festivalo de Esperanta video-filmo okazos la 10-an kaj la 11-an de julio 1999 en Maribor. Oni povas kandidatiigi filmojn en dokumenta kategorio maksimume 15 minutojn longajn kaj en la arta kategorio maksimume 10-minutajn. La filmoj estu ne pli ol 3-jaraĝaj. Sendu kopion en VHS-formato ĝis la fino de majo 1999 al Inter-Kulturo, 2000 Maribor, Besednjakova 1, Slovenio. Samtempe kun la Esperanta video-festivalo en Maribor okazos teatra kaj muzika kulturfestivalo Lent. La premiitajn filmojn vi povas ankaŭ aĉeti: "La eta knabino" (10-minuta) ĉe UEA kaj la "Tagĵurnaloj de IJK-Rijeka" (du-hora) ĉe KEJA, Zagreb, Amruŝeva 5, Kroatio.

(Zlatko Tišljari)

IRANO

● Laŭ oficiala invito de Universitato Alameh Tabatabai en Teherano je 23/11/1998 prof. M.H. Saheb-Zamani alifojje prezentis Esperanton kiel rimedon savantan naciojn por elimiĝi regione kaj atingi internaciecon monde. Ankaŭ ĉi-foje kiel kutime li asertis sciencecon de Esperanto diversflanke por malsamaj uzoj de mondaj scienckampoj de plej novaj sciencoj.



En E-kurso de Universitato Alameh Tabatabai

Fakte tiu E-lekcio estis inaŭgura ceremonio por malfermi novan E-kurson en la universitato. En la E-aranĝo krom studentaj partoprenantoj vidiĝis ankaŭ kelkaj malnovaj E-istoj kun raportistoj de gravaj ĵurnaloj. (Mojtaba Kheir-Khah)

Revenu al la naturo

de HU YUN

LA ĉina turisma servo anoncis, ke 1999 estas la jaro de ekoturismo kaj la temo estas "Iru en la naturon, konu la naturon kaj protektu la medion." Laŭ la temo oni ellaboris turisman programon por protektado de la medio kaj naturaj riĉfontoj kaj por akordo de la homoj kaj naturo.

La Monda Hortikultura Foiro '99 estas konkreta manifestiĝo de la temo "Homaro kaj naturo — marŝi al la 21-a jarcento." La ĉefa enhavo estas ne nur la tradiciaj kaj belaj hortikulturaĵoj de la ĉeestantaj landoj, sed ankaŭ sukcesoj en la protektado de la naturo kaj ekologia medio. La konstruado de la foirejo jam finiĝis antaŭ la fino de 1999. En la foirejo verdas arboj kaj herboj kaj inter ili dissemiĝas gustoplenaj ekspoziciejoj. La plantoj el la ĉeestantaj landoj kreskas bone. Iuj el ili eĉ estas tre raraj. Inter la kvin ĉefaj ekspoziciejoj estas tiu de la homaro kaj naturo, en kiu bildoj kaj videobendoj konigas la intimajn rilatojn inter la homaro kaj naturo. Post unu monato la foiro inaŭguriĝos kaj daŭros ses monatojn. Tiam la turistoj ĝuos la naturon en la mondo de vegetaĵoj.

La Monda Hortikultura Foiro '99 okazos en Kunming de Yun-

nan-provinco pro tio, ke la provinco estas fame konata kiel regno de vegetaĵoj kaj animaloj. Yunnan havas altklasajn vegetaĵojn de 18 000 specoj. En la primitiva arbaro de Xishuangbanna oni povas trovi multe da raraj tropikaj arboj, aŭ kun altega trunko, aŭ kun larĝa



La internacia domo de la Monda Hortikultura Foiro en Kunming

krono, aŭ kun intervolviĝantaj branĉoj. Oni jam translokis en la foirejon pli ol 1 000 arbojn kreskintajn en la arbaroj de la provinco, kaj nemalmultaj el tiuj arboj venis el la primitiva arbaro de Xishuangbanna je 1 000 kilometroj fore.

La arbara turismo estas grava programo de la ekoturismo. En Ĉinio estas 874 arbaraj parkoj, el kiuj 292 estas ŝtataj. De 1992 ĝis 1997 la parkoj akceptis 300 milionojn da vizitantoj. En Ĉinio la unua arbara parko naskiĝis en Zhangjiajie de Hunan-provinco antaŭ ĉ. 15 jaroj. Tiam pro la malforta trafiko oni devis veturi 8 tagojn al Zhangjiajie por 2-taga


vizito. Nun vizitantoj multiĝis pro tio, ke ili jam povas atingi ĝin per aviadilo. La vizitantoj diris, ke ĝi estas belega kaj ili ĝuos ĝin denove. Oni povas vidi prosperan arbaron kaj droni en kvieteco, kio ne eblas en urbo. Kaj krome, turismo profitigas la lokanojn. Ilia gajno el turismo estas pli granda ol la komerca valoro de arboj, kaj ili ne bezonas konsumi eĉ unu arbon. En Ĉinio 100 000 kamparanoj jam enspezis pli multe dank' al la arbara turismo.

La arbara turismo ankaŭ prezentas multe da programoj, ekzemple vizitado, feriado, ekspedicio kaj scienca esplorado. En la ekoturismo '99 estas ankaŭ programo pri arbara turismo, ekzemple montgrimpado, kajakado, rigardo de sovaĝaj bestoj kaj esplorado de ekologia medio.

Estas ankaŭ aliaj programoj, kiel dezerta turismo, mara turismo, biciklado kaj skiado. La ekoturismo enhavas plantadon ĉe la Flava Rivero kaj en la dezerto Mu Us. Plantado estas banala, tamen memorinda afero, ke vi per viaj propraj manoj verdigas pecon da loko en la dezerto. Iasence, tia turismo pliriĉigos la enhavon de la Monda Hortikultura Foiro '99. En la turismo oni bone protektos la medion kaj alvokos al ĉiuj homoj protekti nian medion. ■



Grandioza ekspozicio sur la ĉielo



Ĉinaj aviadaj instalaĵoj ekspoziciataj

Teksto de ZHAO XI

Fotoj de FENG JIN

Inter la 15-a kaj 22-a de novembro 1998 en Zhuhai, ĉemara urbo de suda Ĉinio, okazis la Ĉina Internacia Aviada Ekspozicio.

La ekspozicion partoprenis ĉ. 500 kompanioj de 25 landoj kaj regionoj, kiaj Rusio, Usono, Britio, Germanio, Francio, Kanado, Italio kaj Ĉinio. Prezentiĝis kelkdek aviadiloj de ĉ. cent kompanioj, inkl. pasaĝeraviadilo A-340, ŝarĝaviadilo "Konkordo" kaj batalaviadilo "Kirlovento" el Francio; komerca aviadilo "Golfo 5" kaj helikoptero BEL el Usono; senpilota sklotaviadilo IAI el Izraelio; ŝarĝaviadilo IL-96 el Rusio. Krome estis ankaŭ grandioza manifestacio de bombaviadilo FBC-1, leĝera helikoptero 11, armita helikoptero 9G, pasaĝeraviadilo 200A kaj transportaj raketoj Changzheng 2 (kun helpakceliloj) kaj Changzheng 3B, kiuj kaptis la atenton de la rigardantoj.

La aviadakrobataj teamoj "Militkavaliro" de Rusio, "Ora Sonĝo" de Britio, "Polusa Lumo" de Kanado kaj "Bayi" de Ĉinio prezentis akrobataĵojn.

La ekspozicio estas kiel ponto, kiu ebligas al la ĉina aviadindustrio suriri la internacian scenejon.






En la halo de aviadilaj modeloj



Fotado ĉe aviadilo



Prezentado de la aviadakrobata teamo "Bayi"



Antaŭ aviadilo prezentado

Kial ili forlasis sian antaŭan okupon?

de PANG BIAN

KOMPARE kun siaj kunlernantoj en la universitato Lin Hong estis feliĉa. Diplomiginte ŝi akiris postenon en registara oficejo. Ŝi estis kontenta pri tio kaj diligente laboris tie plurajn jarojn. Foje ŝi kaj ŝia filineto preteriris frukto-budon, la filineto petis liĉiojn. Pro la alta prezo, ŝi rifuzis la filineton, ĉar tiam en la poŝo ŝi havis monon por nur malpli ol kvaron-kilogramo da liĉio. Ŝia filino ploris. Tiu afero rompis ekvilibron en ŝia koro kaj estigis ŝian malkontenton pri la laboro. Efektive ŝi ne deziris multekostaĵojn. Ŝi esperis nur, ke la solfilino estos bone klerigota. Post longa konsidero ŝi forlasis la registaran oficejon. Nun ŝi jam havas sian propran butikon sur movoplana komerca strato.

ŜTATA OFICO NE PLU ALLOGAS

Antaŭe en Ĉinio ŝtatoficistoj havis altan pozicion kaj pli da ŝanĉoj esti promociitaj, kaj tial multaj intelektuloj deziris oficistiĝi. Tamen kun disvolviĝo de la merkata ekonomio ili rimarkis, ke ilia enspezo estas multe malpli granda ol tiu de komercistoj, privataj entreprenistoj kaj dungitoj de multaj fremdlandaj kompanioj. Tio komprenigis la kutime sinoferemajn kaj ŝparemajn intelektulojn, ke monĝajno ne estas senescepte malhonesto. Se vi havas sufiĉe da mono, vi povas aĉeti domon, veturi per

taksio sed ne loĝi en mallarĝa ĉambro kaj perdi tempon en homo-plena aŭtobuso... Tial, nemalmultaj oficistoj volonte demisiis, ili aŭ komercistiĝis aŭ fariĝis dungitoj de kompanioj. Ŝajne en simpligo de administra strukturo de oficejo ili pli trankvile akceptis deposteniĝon ol la laboristoj, ĉar por ili la socio estas ŝancoplana. Ili preferis fari inciatan laboron kaj ekzerci sin en sociaj konkurencoj ol vivi monotonan vivon en la oficejoj. Antaŭ kelkaj jaroj iu esperoplana funkciulo forlasis sian okupon kaj dungigis en privata kompanio. Li diris, ke li preferas fari kreivan kaj defian laboron. En la pasintaj dekkelkaj jaroj li studis politikojn de ekonomia sistemo. Nun li volas praktiki tiujn teoriojn en la realo.

RIPOZI KAJ STUDI

Iuj "blankaj kolumoj" neniom timas senlaboriĝon, ĉar ili funkciis jam kelkajn jarojn en kompanioj investitaj de eksterlandanoj sole aŭ de ĉinoj kaj eksterlandanoj kune, sekve de tio ili ne nur kompare multe enspezis, sed ankaŭ fariĝis kapablaj en konkurenco kaj administrado. Iu pli ol 30-jara direktoro diris: "Eksigo kaj ekŝigo ne estas gravaj. Por mi estas facile trovi novan laboron." Li havas jam du diplomojn kaj administran sperton, kaj bone parolas en fremda lingvo.

Alia direktorino volas forlasi sian laboron pro troa okupateco. Ŝi volas ripozi kaj lerni. Ŝi planas, ke post ekŝigo ŝi daŭre dungos servistinon por zorgi hejmajn laborojn; kaj ŝi mem ĉiutage ludos

pianon tri horojn, faros gimnastikon unu horon, lernos fremdan lingvon du horojn, kaj krome studos lecionojn pri industria kaj komerca administrado kaj legos la librojn, kiujn ŝi ne legis pro manko de tempo... post du jaroj ŝi denove laboros.

Li Li, 29-jara, forlasis sian laboron kaj rezignis la salajron, 5 000 juanojn por ĉiu monato por lerni fremdan lingvon. Ŝi opinias, ke poste ŝi havigos al si laboron pli interesan kaj pli enspezigan kiel privata instruistino, kiel Helen Keller, kiu faris miraklon en sia vivo. Ŝi kredas, ke ŝi sukcesos en eduko al saĝaj, petolemaj, ludemaj geknaboj de 1-5-a klaso de elementa lernejo. Ŝi rekomendos sin sur Interneto.

La optimismo kaj memfido devenas de juneco kaj alta klereco. La granda salajro ebligas al la kapablulinoj ĝui la vivon kaj pliriĉigi siajn sciojn por havi pli bonan laboron.

FARI ŜATATAN LABORON

Qu Yaping, bela kaj svelta, nun estas mastro de bieno de pli ol 36 hektaroj. Antaŭ du jaroj ŝi investis la bienon per sia tuta mono.

En universitato ŝi studis ekonomikan administradon. Diplomiginte, ŝi eniris en registaran oficejon. Enuinte de tiea laboro, ŝi dungigis en iu kompanio. Poste ŝi forlasis la laboron kaj mem funkciigis sian propran kompanion. Sekve ŝi havigis al si domon, aŭton kaj sufiĉe da mono por sia estonteco. Ĉe semajnofino ŝi kaj ŝia edzo aŭ pasigis feriojn sur stepo,

aŭ vizitis klubon por lerni rajdon. Ili vivis vivon senzorgan kaj romantikan. Tamen Qu aspiris idilian vivon, kaj fine ŝi iris en kamparon. Ŝi klarigis al siaj amikoj, ke la bonkvalita vivo ne signifas bongustaĵojn nek luksajn vestojn, sed ĝui spirite kaj fari sian ŝatatan laboron. Ŝi informiĝis de ĵurnalo, ke en Ĉinio la pokapa kampo areas malpli ol 0.1 hektaron, kaj ĉiujare pli ol 14 milionoj da infanoj naskiĝis kaj je 50 000 hektaroj reduktiĝas la agraro... Sciinte tion, Qu diris: "Mi volas ŝanĝi la teron en oron."

Ŝi ricevis parcelon laŭ kontrak-

Qu Yaping



to. Antaŭ tio ŝi konsultis profesorojn de agronomia universitato pri kulturado, irigacio kaj bredado de fiŝoj kaj kokoj, kaj invitis iun vicprofesoron kiel sian teknikon direktanton. Ekster ŝia atendo en la unua jaro la hektara produktokvanto de ŝia kampo estis pli alta ol tiu de lokaj kamparanoj.

En tio, kompreneble, la ŝvitado estas pli ol ĝuado. Kvankam ŝi jam dungis helpantojn, tamen en rikolta kaj sema sezonoj ankaŭ ŝi devas labori sur kampo: rikolti maizon kaj akvomelonojn, tegi bedon per plasta membrano, bori

puton kaj konstrui murojn... Foje en la pasinta jaro pro lacego ŝi endormiĝis apogante sin sur tritika stako eĉ ne sentante muŝon sur sia vizaĝo.

Ŝi loĝas en tre mizera domo forlasita. Vespere ŝin akompanis nur hundo. Foje ŝi laboris ĝis noktomezo. Starante en la korto sub lazura ĉielo kaj spirante la bonodoro de la tero, ŝi aŭskultis la faman "La Blua Danubo" kaj ŝia animo tute fandiĝis en la muziko...

Ŝi fieris pro tio, ke ŝi produktis unujare pli ol 350 000 kilogramojn da greno, kiuj sufiĉas por uzo de multaj homoj. Ŝi diris: "Mi rigardas la bienon kiel mian filon." Ŝi desegnis la bildojn pri sia bieno en la estonteco: floroj prosperos, kokoj kokerikos, bovoj kaj ŝafoj estos en gregoj, infanoj ĝoje ludos, blanka lakto, freŝaj fruktoj, verdaj legomoj abundos kaj bariloj ĉirkaŭos la lignajn domojn, en kiuj ŝi povos kviete legi, pentri, gravuri kaj aŭskulti muzikon. Tiam ŝi ankaŭ povos inviti aliajn al ŝia loĝejo, por ke ili ĝuu kun ŝi la idilian vivon. Ŝi ankaŭ deziras havi bonan ĉevalon ke ŝi povu rajdi ĉiumatene.

Laŭ la kontrakto 34-jara Qu Yaping rajtas mastrumi la bienon por 30 jaroj. Ŝi pensis, ke eble ŝi ne plu ŝanĝos laboron en la tuta vivo. ■

Dankon al la kondolencantoj

Post la forpaso de nia vicĉefredaktoro Dai Song'en, venis al ni kaj al la Ĉina Esperanto-Ligo multaj kondolencaj mesaĝoj el diverslandaj samideanoj kaj organizoj, kiuj rememorigas la kontribuojn de Dai kaj siajn kontaktojn kun li. Ili ĉiuj montras sian atenton pri la Esperantomovado en Ĉinio.

Nome de la ĉina esperantistaro ni kore dankas ĉiujn samideanojn, kiuj donis forton al ni en tiu tempo.

La Red.

Belaj fotoj dezirataj

De la januara numero de 1999 la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" aperas sur p. 2. Ĉiunumere ni aperigas unu foton. Por ke la rubriko pli plaĉu al la legantoj, ni deziras bonajn fotojn, kiuj temas pri naturaj pejzaĝoj kaj naciaj moroj. Ne taŭgas portretoj kaj personaj fotoj.

Dankon pro viaj subteno kaj kunlaboro!

La Red.



Niujie

Islamanoj en Niujie

Fotoj de DU DIANWEN

Niujie kun totala areo de 1.39 kvadrataj kilometroj estas fama kvartalo de huj-oj en Pekino. Tie vivas pli ol 10 mil huj-oj. Antikva moskeo staras en la kvartalo kun tradicia islama kulturo.

La historio de Niujie komenciĝis en la 10-a jc., kaj en la 13-a jc. Niujie jam havis dekon da miloj da huj-oj. En la historio la tieaj huj-oj plejparte estis malriĉaj. Pro malstabileco de la socia vivo la tiea ekonomio disvolviĝis malrapide. La grandeco, domaranĝo kaj arkitekturaj trajtoj de la nuna Niujie fundamente estas tiuj de la lasta periodo de Qing-dinastio (1644-1911). Kaj la loĝantoj plejparte estas indiĝenaj.


La fama Moskeo de Niujie estas ne nur grava preĝejo, sed ankaŭ ejo, kie aktivadas imamoj, predikantaj Koranon. Ĝi estas ankaŭ lulilo de imamoj. En la historio en Niujie aperis multaj famaj imamoj.

La tieaj huj-oj plejparte estas lertaj en komerco. Tie troviĝas butikoj de moĉio kaj tiuj de bovaĵo kaj ŝafaĵo. Tie iuj kolektas kaj vendas jadaĵojn, porcelanaĵojn kaj antikvaĵojn. Iliaj vendejoj troviĝas ne nur en Niujie, sed ankaŭ en aliaj kvartaloj de Pekino.

鲜肉



Kolektanto de porcelanaĵoj



En la Moskeo de Niujie



牛街 白記



Preparado de moĉio



Niuje havas diversajn tradiciajn etnaĵojn, kiujn ĝus multaj klientoj ŝatas.



La Niuje-a bazaro de bovaĵo kaj ŝafaĵo estas la plej granda en Pekino.



LIBRO EL LIGNO

de ZHANG HANGMEI

EN sia romano “La Ĝibulo de Notre Dame de Parizo” franca verkisto Victor Hugo diris, ke konstruaĵo estas “libro el ŝtono”. Lia frazo havas du signifojn: unue, la konstruaĵo enhavas multjaran laboradon kaj kulturan heredecon; due, la katedralo Notre Dame admirata de Hugo kaj multaj aliaj eŭropaj konstruaĵoj estas faritaj el ŝtono. Laŭ la esprimo de Hugo, la ĉina konstruaĵo estas “libro el ligno” — ĉar ĉinoj konstruis domon de ligna strukturo, antikvaj ĉinaj konstruaĵoj estas ĉefe lignaj. Kial do eŭropanoj uzis ŝtonon, kaj ĉinoj preferis lignon?

Iuj donis simplan respond-

on — la baseno de la Flava Rivero, lulilo de la antikva ĉina kulturo, estis varmeta kaj malseka, kaj tie kreskis densaj arbaroj. Tial ligno iĝis ĉefa materialo de antikvaj ĉinaj konstruaĵoj. Kaj la piramidoj de Egiptio, la akropolo de Ateno kaj la panteono de Romo estis konstruitaj en regiono riĉa je ŝtonoj. La diraĵo “uzi lokan materialon” estis vaste konata por klarigi tian fenomenon.

Poste venis kontraŭa opinio — ĉie estas ŝtono, kaj ĉie troveblas ligno. Ĉe Pekino ne mankas ŝtono, kaj en Eŭropo multas arbaroj. Ankaŭ tio estas fakto.

Fakte tiuj nacioj, kiuj konstruis ŝtonajn grandiozaĵojn, en la primitiva kaj sklava socioj uzis ĉefe lignon. Ekz. la antikvaj

Egiptio, Grekio kaj Romio uzis ĉefe lignon, sed ne ŝtonon. Tamen ligno estas putriĝema, nefajroimuna kaj facile eluzebla. Kaj ŝtono havas avantaĝon tiuflanke. Pro ŝanĝiĝo de iloj kaj multiĝo de sperto, en multaj regionoj oni pli kaj pli multe uzis lignon ol ŝtonon. Tamen Ĉinio estis escepto. La kialo ne estas, ke en Ĉinio mankas ŝtono, sed estas tio, ke ekzistas diferenco de konceptoj pri valoro.

La piramidoj, akropolo kaj panteono esprimas la strebon al “eterneco”. Kaj ĉinoj realisme rigardas la konstruaĵojn. Ĉinio neniam spertis la tempon, kiam dioj ĝuas la plej altan aŭtoritaton; kaj ĉinoj neniam rigardis konstruaĵon kiel eternan monumenton. Eŭropanoj konstruis ŝtonajn panteonojn kaj preĝe-

jojn eĉ en centoj da jaroj por atingi “eternecon”, ekz. ili dediĉis 120 jarojn al konstruado de la katedralo Notre Dame de Parizo kaj centojn da jaroj al tiu de la templo de Zeŭso en Olimpio de Grekio. En Ĉinio, la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiu unuigis la tutan Ĉinion, restis sur la trono nur 11 jarojn, tamen li konstruigis Epang-palacon, kiu okupis grandan areon; Zhu Di, imperiestro de Ming-dinastio (1368-1644), konstruigis la urbon Pekino kun majesta imperiestra palaco en nur 16 jaroj. Eŭro-

ŝultroj de ĝia granda pontarkaĵo estas po du malgrandaj arkoj. Tia projekto estis avangarda kaj rara en la mondo. En miloj da jaroj ĉinoj pli multe uzis lignon en konstruado por reala bezono. Kaj samtempe ĉinoj evitis la malbonajn flankojn de ligno kaj kreis artajn formojn kaj planojn konforme al ligna strukturo en konstruado de palacoj, maŭzoleoj, temploj kaj loĝdomoj. Tiel ligna strukturo iĝis ĉefa trajto de antikva ĉina konstruaĵo.


Antikvaj ĉinoj utiligis la formon, kvaliton kaj kombinon de

bajn liniojn. Por la domo de ligna strukturo la tegmento estas granda, tamen nepeza kaj leĝera kiel vosto de bela birdo.

Ligna domo pli facile difektiĝas ol la ŝtona, tamen pli facile rekonstruata. Krome, ligna domo strukture estas libere aranĝebla por diversaj funkcioj. Unu ligna domo estas malpli granda ol ŝtona domo. Tial ĉinaj domoj staras grupe kaj montras sian grandiozecon. Estas sufiĉe evoluinta la planado de aro da domoj de la antikva Ĉinio. Ekz. en Pekino iuj loĝejoj kun kvadrata korto staras en ĉefa loko kaj aliaj en malĉefa; iuj estas videblaj tuj post kiam oni eniras la korton, kaj aliaj kaŝitaj. Tio esprimas la artan guston kaj karakterizaĵon de Ĉinio. Kaj la Imperiestra Palaco en Pekino etendas la domojn laŭ la centra linio, kaj varias la grandeco, formo, ornamaĵo kaj koloro de la domoj, kiuj radias grandiozecon kaj harmonion. En tradiciaj ĝardenoj ĉinoj kreis novan pejzaĝon aŭ prenis la naturan bildon kiel fonon, tio estas originala metodo de ĉinoj.

Ĉinoj konstruis grandan tuton per diversaj negrandaj domoj. Tiel la ĉarpentistoj povis dividi la laboron en diversajn partojn, kaj la elementoj de la domo povis esti normigitaj kaj antaŭpreparitaj, kaj kunmetitaj en la konstruejo. Tia maniero estas tre simila al la moderna. Ĝuste per tia maniero ĉinoj en mallonga tempo konstruis diversajn grandiozajn palacojn.

En miloj da jaroj ĉinoj perfekte utiligis la lignan strukturon, en kiun ili enmetis siajn historion kaj kulturon. La originala ĉina domo de ligna strukturo estas ja libro tre leginda. ■




Konstruaĵoj de ligna strukturo


panoj konstruis domon por dioj, dum ĉinoj por homoj. Dioj estas eternaj, dum homoj realaj. Por la eternaj dioj eŭropanoj elektis solidan ŝtonon, kaj por realaj homoj ĉinoj preferis lignon pli molan ol ĝi.

Laŭ ĉinoj, konstruaĵo same kiel vestoj kaj veturiloj devas esti ofte renovigata. Fakte ĉinoj bone sciis uzi ŝtonon. Ĉe la komenco de la 7-a jarcento, en Ĉinio konstruigis ŝtona Zhaozhou-ponto. Sur ambaŭ

la ligna strukturo por atingi harmonion de funkcio, formo kaj arto. Ekz. la muro de tradicia ĉina ligna domo bezonas etendiĝantan aleron kontraŭ pluvo. Tiel arka elstaraĵo ĉe trabo havas gravan funkcion subteni la aleron, kaj ĝia bela formo ornamas la domon. La larĝa alero protektas la muron, tamen baras la sunradiojn. Ĉinoj faris suprenlevitan aleron por lasi la sunlumon en la domon. La ĉina tegmento ekhavis belajn kur-



Interne de la Halo de Preço por Riça Rikolto



La Longa Koridoro en la Somera Palaco

Taihe-halo en la Imperlestra Palaco







Âiela Altaro



La Imperiestra Palaco





Loĝdomoj en suda Ĉinio

Ligna skulptaĵo sur antikva loĝdomo

Esplorado de glacio

Teksto kaj fotoj de ZHA CHUNMING kaj ZHANG MINGCHENG





Sciencistoj esplorantaj sur glacio




Glaciblokoj similaj al lotusfolioj, formiĝintaj pro vento kaj tajdoj

Glacirompa ŝipo surmare

Sub la influo de la atmosfera fenomeno El Nino, la glacio sur Bohai-maro kaj la Flava Maro ekdegelis kaj la malpeza glacio flosis laŭ vento kaj oceana fluo. Tio malfaciligas prognozon pri la mara medio kaj minacas la sekuron de putobora platformo sur Bohai-maro.

La 4-an de februaro 1998, kun 20 sciencistoj pri meteorologio, hidrologio kaj glaci-esploro, la ĉina scienc-esplora ŝipo "Haibing 722" eknavigis de Qinhuangdao-haveno al Bohai-maro kaj la Flava Maro. La sciencistoj spertis la animskuan scenon: Por trapasi regionon de dika glacio, la ŝipo sin puŝadis kontraŭ glacieron kun areo de pli ol cent kvadrataj metroj. Forta krako! La manganŝtala antaŭo de la ŝipo multe perdis en kolido la surfacan lakon.

Laborante sur glacio nur 18 centimetrojn dika, la sciencistoj eĉ sentis la glacieron fendiĝanta. En la 6-taga laboro ili venkis multajn malfacilojn: veturi en ventego, nebulo, glaciregiono kaj ŝeraro.





Por preni specimenojn de marakvo kaj glacio



MENGSHAN-TEO

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de YANG ZHONG


MENGSHAN-MONTO estas vualita de nuboj kaj nebulo, kaj sur la monto kreskas verdaj tearboj. Mengshan-monto, sidanta en Sichuan-provinco, estas sankta loko, kie troviĝas la plej frua teĝardeno: antaŭ pli ol 2 000 jaroj, Wu Lizhen, dum branĉokolektado, rimarkis, ke folioj de ia arbo povis senlacigi kaj refreŝigi homojn. Li kolektis semojn de la arbo kaj kulturis ilin sur la monto. Poste li infuzis la foliojn por kuraci samvilaĝanojn. La teo estas aromega. En la 724-a jaro (Tang-dinastio) ĝi fariĝis trinkaĵo speciala por kortego.

En la tetrinkejo sur la montpinto ni ĝuis la teon. Tute kiel notite en la antikva libro, la folioj estas

maldikaj kaj longaj, la gusto estas pura kaj dolĉa, la koloro estas verdeta, la aromo el taso longe ŝvebas en la aero. Laŭdire, en antikveco, en la 4-a aŭ 5-a de aprilo ĉiujare guberniestroj en novaj vestoj iris al Mengshan-a Monaĥejo por preĝi, kaj gvidis 12 monaĥojn al la imperiestra teĝardeno por pluki tefo-



Rostado de tefolioj





Dispecigo de tefolioj

Tetrinkejo en antikva templo



liojn. La abato propramane rostis la refoje elektitajn foliojn. Fine la tefolioj estis pretigitaj kiel tributo al la kortego.

Kial tia teo povas kreski sur Mengshan-monto? Ĉar tie estas tre humide, nebulo kaj pluvo oftas. La klimato taŭgas por kresko de teo. Multe da loĝantoj de la gubernio Mingshan vivtenas sin per tekulturo. En la 7-9-a jc., ĉinoj kaj japanoj ofte intervizitis. La kortego prenis la tributan teon kiel donacon al malproksimaj amikoj. Finlerninte en 840, japana bonzo Majstro Cijue revenis hejmen de Chang-an, ĉefurbo de Tang-dinastio, la imperiestro donacis al li 1 kilogramon da Mengshan-teo kaj bulojn da kunpremita teo. La kunpremita teo estas oportuna por kunportado. De la 11-a jc. tebriko (kunpremita teo en formo de briko) produktita en Mingshan fariĝis necesajo por la vivo de nacimalplimultoj en la sudokcidento kaj nordokcidento de Ĉinio. Tibetanoj kaj aliaj nacimalplimultoj ĉe landlimo fondis foiron por ŝanĝi ĉevalon kontraŭ teo. Dume la kortego dekretis, ke Mengshan-teo povas esti uzata ekskluzive por ŝanĝi kontraŭ ĉevaloj.

Ni venis al la "imperiestra teĝardeno", ĉirkaŭita de ŝtonaj balustradoj kaj gardata de ŝtona tigro. Laŭdire tie estas la loko, kie Wu Lizhen plantis teon. Ne malproksime estas puto gardata de paro da ŝtonaj drakoj. La akvo en la puto estas neprofunda, klara kaj riĉa. La vojaĝantoj preĝas kaj prenas akvon por infuzi teon. Ili kredas, ke la iniciatoro akvumis la tearbojn per la akvo el tiu puto. La monaĥejo, en kiu monaĥoj antaŭe rostis tributan teon, nun estas la oficejo de Mengshan-tekultivejo, kaj ankaŭ ordinaraj homoj povas trinki la imperiestran teon. ■



Plukado de Mengshan-tefoloj



Mengshan-monto

Tagmanĝo en franca kampara restoracio

de WANG LIHUA

DUM la pasinta UK okazinta en Montpeliero, Francio, mi plezure ĝuis laŭ tieaj moroj kaj kutimoj tute malsamaj al la ĉinaj. Precipe la tagmanĝo en franca kampara restoracio donis al mi profundan impreson.

LA KAMPARA RESTORACIO

Post pli-ol-duonhora veturado de la antikva urbo Avinjono, nia aŭtobuso haltis antaŭ iu restoracio en kamparo. Tio estas duetaĝa domo, kun ruĝa tegmento, flavaj muroj kaj larĝa elstara balkono, ĉirkaŭita de prosperaj arboj, aromaj floroj kaj berilaj kampoj. En la kamparo sub la tagmeza suno aŭdiĝis nur kantoj de cikadoj.

Laŭ ligna ŝtuparo ni venis al la manĝejo en la dua etaĝo. Kun tempopaso la koloro de ĝiaj lignaj planko kaj muroj malheliĝis kaj impresis per antikveco. Kvar vicoj da longaj tabloj sufiĉis por 200 klientoj. Sur la tabloj estis manĝiloj, butero, fromaĝoj kaj vino. Sur alia longa tablo estis diversaj trinkaĵoj kaj almanĝaĵoj, kiujn oni povis preni laŭ sia prefero. Kelneroj servis kun afabla rideto. Ĉio tio ĝojigis min, kiu venis el Oriento.

EKZERCADO PER TRANĈILETO KAJ FORKETO

Ĉe tablo mi ĝuis francajn manĝaĵojn kune kun miaj amikoj. Helruĝa kaĉo kun salikokoj ŝajne estis apetito-veka. Mi prenis kuleron da kaĉo por gustumado. Ho, ĝi estis iom sala kaj fiŝ-odora. Nia ŝoforo, kiu sidis apud mi, sciigis

min, ke tio estis spicaĵo el salikokoj farita de kamparanoj. La panon mi trovis iom malmola kaj acideta. Malgraŭ ke mi kutimas manĝi rizaĵon kun pladoj hejme, mi manĝis ĝin pecon post peco kun sufiĉe multe da butero.

Sed kiam oni prezentis al mi pladon el verdaj lentoj kaj koka femuraĵo, mi estis multe embar-



Tagmanĝo

sita. En Ĉinio mi vidis, ke okcidentanoj ne scias kiel uzi manĝebastonetojn, kaj ridis pro ilia mallerteco. En Francio estis mia vico fali en embarason, ĉar kiel ajn mi penis, mi ne sukcesis pecetigi la kokaĵon per la tranĉileto. Mi do riproĉis en mi mem la tranĉileton, ke ĝi estas malakra. Ne povante manĝi la kokaĵon pere de la mano laŭ kutimo en Ĉinio, mi povis fari nenion alian ol admiru la lertecon de francaj amikoj en uzado de tranĉileto kaj forketo.

GUSTUMADO DE FROMAĜOJ

Antaŭ longe mi sciis, ke en Francio estas 360 specoj da fromaĝoj. Dum tiu tagmanĝo la restoracio regalis nin per pluraj specoj da fromaĝoj, kies nomon sciigis al mi la ŝoforo. Li demand-

is min, kion mi volas. Montrante la pinton de la fromaĝo en triangula formo, mi respondis: "Iomete." Li ridis. Jen, sur tiu parto estas multe da verdaj makuloj kiel kvinteseneco, do pro tio oni tranĉas fromaĝon ĉiam laŭ ĝia rando, sed neniam ekde ĝia pinto. Tamen, nia ŝoforo detranĉis por mi la pinton. Mi enbuŝigis la peceton kaj maĉetis ĝin. "Krom sala gusto, mi ne trovis guston eksterordinaran." Nia ŝoforo klarigis al mi, ke ĝi estas farita el kaprina lakto kaj oni kutime prenas ĝin kune kun tiu el la bovina. Francoj preferas preni fromaĝojn kune kun vino produktita en sama loko. Mi diris al francaj amikoj, ke escepte de nomadoj, ĉinoj preferas bovinan lakton ol fromaĝo. Franca amiko diris al mi, ke meznombro ĉiu franco konsumas ĉiujare 20 kg. da fromaĝoj, plej multe en la mondo.

EBRIETAJ POST TAGMANĜO

Post kafo finiĝis la tagmanĝo. Nia afabla ĉiĉerono insiste invitis nin al drinkejo. Li proponis al ni *pastis*, bona gusta trinkaĵo farita el frukto produktita en suda Francio.

Kiel atendite *pastis* multe plaĉis al ni. Ege fiera pri la longa historio de vinfarado de Francio, nia ĉiĉerono diris al ni, ke jam en antaŭhistorio francoj ekfaris vinon el vinberoj. "Jam antaŭ pli ol 2 mil jaroj la vinber-kulturado kaj vinfarado enĉiniĝis laŭ la Silka Vojo..." diris mi. La vino ja fariĝis nia komuna babiltemo.

Glaso da *pastis* sufiĉis por ruĝigi miajn vangojn. Ankaŭ miaj kolegoj fariĝis tute ruĝaj. Tio memorigis al mi ĉinan proverbon: La homoj nur sin ravas, sed ne ebrietas pro vino. Fakte, ni ebriete ravis nin pro nia interparolo interesa pri kulturo orienta kaj okcidenta. Tiam sinjorino apud mi diris kun rideto: "Vidu, la suno en suda Francio estas tiel frapa, ke via vizaĝo ruĝiĝis ĝis la oreloj." ■

JI Xianlin, profesoro de la Pekina Universitato, tiel taksis en sia artikolo la gravan rolon de Makao (Aomen) en la interŝanĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj: "En la historio de pli ol 5 000 jaroj de Ĉinio plurfoje kulminis kulturaj interŝanĝoj. La lasta kaj la plej grava estis enkondukiĝo de la okcidenta kulturo. Ĝi ekis en la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644) kaj la unuaj jaroj de Qing-dinastio (1644-1911). Kaj la trapasejo de la enkondukiĝo estas Makao." "En la lastaj jaroj de Ming-dinastio fakte estis portugaloj, kiuj enkondukis la okciden-



Arkajo antaŭ preĝejo

tan kulturon en Ĉinion tra Makao."

SOCIO KIEL MUZEO

Nia konado pri la originala kulturo de Makao komenciĝis de lingvo. En aviadilo de la Makao Flugkompanio de Pekino al Makao ni aŭdis disaŭdigon en la portugala, angla kaj ĉina lingvoj kaj la kantona dialekto. Kaj ni ofte renkontis en Makao tian kulturan fenomenon, ke hotelaj prospektoj kaj diversaj eldonaĵoj estas presitaj en la tri lingvoj.

Dum la pasintaj pli ol 400 jaroj de portugala okupado, Makao iam estis la plej prospera komerca urbo

de la mondo. Ĝi estis grava punkto sur la "Mara Silka Vojo" kaj la plej granda centro de katolika misiado en la Malproksima Oriento. La originala fenomeno de la socio kaj kulturo de Makao, formiĝinta en tia historio, estas frukto de la longtempa interŝanĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj.

Oni diras, ke arkitekturo spegulas historion. Sur konstruaĵoj ni tuj rimarkis la kulturajn karakterizaĵojn de Makao. De la Internacia Flughaveno al la urbocentro ni trairis du tre longajn surmarajn pontojn, kiuj interligas la Makaan Duoninsulon kun insulo en maro. En la urbocentro, inter la domturoj navedas diversaj aŭtoj. La vigla spektaklo pruvas, ke Makao estas moderna urbo.

En Makao ĉie ni vidis antikvajn konstruaĵojn, kies parto estas en eŭropa stilo. Tion ekzemplas la Rezidenta Domo en persikflora koloro. Ankaŭ la Urbodoma Placo portas la sudeŭropan stilon. La planko de la placo de 3 700 kvadrataj metroj estas pavimita el rulŝtonoj en desegno de marondoj.

Granda parto de la antikvaj konstruaĵoj estas temploj kaj preĝejoj. Nekompleta statistiko nombras pli ol 40 budhismajn kaj taoismajn templojn, pli ol 20 katolikajn katedralojn, dekon da kirkoj kaj kelkajn moskeojn. Tiu fenomeno spegulas la liberecon de religia kredo kaj la konkordan kunekzistadon de la diversaj religioj.

Katolikismo estas ŝtata religio de Portugalio kaj havas eksterordinaran pozicion en Makao. La katedraloj portas barokan stilon, sed en iuj partoj ni vidis karakterizaĵojn de la orienta arkitekturo. Plej okulfrapas la fasado de la katedralo San-Paŭlo. Ĝi imponas pro la alta situo sur la bazamento kun 70 ŝtupoj. La fasado estas ornamita per reliefoj de peonioj kaj leonoj en la tradicia stilo de Ĉinio. Sendube ĝi estas majstra artaĵo manifestanta kunfandiĝon de la orienta kaj okcidenta kulturoj.

Kanonaj bastionoj kaj fuortoj estas alispecaj gravaj kulturaj restaĵoj de Makao. Nun tie nombriĝas 6-7 tiaj restaĵoj sur montetoj. Ili estis konstruitaj en la 17-a jarcento por



rezisti piratojn kaj invadantojn kaj defendi la misiistojn. Nun ili ne plu ludas la militan rolon kaj fariĝis turismaj vidindejoj.

KONKORDO DE LA NACIOJ

En Makao la kunekzisto de novo kaj malnovo kaj la kunfandiĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj montriĝas ne nur en arkitekturo, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo.

Ni ofte aŭdis la vorton "indiĝenaj portugaloj". Ili estas idoj de portugaloj en Makao aŭ miksdevenaj idoj. De multaj generacioj indiĝenaj portugaloj vivas en Makao kaj bone posedas la portugalan lingvon kaj la kantonan dialekton. Krome ili kreis miksitan lingvon el la portugala kaj ĉina lingvoj. La indiĝenaj portugaloj havas siajn proprajn morojn kaj grandan kvanton da literaturaj kaj artaj verkoj kun riĉa enhavo, en kiuj enkorpiĝis fortaj kulturaj karakterizaĵoj de la konkorda kunvivado de la nacioj.

La loĝantoj de Makao celebras kaj la tradiciajn ĉinajn festojn kaj ankaŭ la portugalajn. La religiaj aktivadoj kaj festoj, precipe tiuj de katolikismo, estas tre multaj.

En la ĉiutaga vivo ĉie vide-





ponto inter la kulturoj orienta kaj okcidenta

blas influoj de malsamaj kulturoj. Ekzemple, maĝango estas ludo ŝatata ne nur de ĉinoj, sed ankaŭ de portugaloj. Kaj en gastronomio ni rimarkis pli evidentan fenomenon de miksiĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj. Ni estis regalitaj per portugalaj pladoj, kies gusto tre plaĉis al ni. Sed oni diris, ke tiuj portugalaj pladoj jam "makaiĝis".

En butikoj nin interesis la fenomeno, ke ekzistas samtempe pluraj sistemoj de mezurunuoj, ekzemple tiu de pezo. Tie oni uzas la universalan sistemon, la britan funton kaj la ĉinan ĝin-on.

PROSPERA TURISMO

Makao najbaras al Hongkong, Taiwan kaj la sudorient-aziaj landoj. La varmeta kaj malseka klimato prosperigas la vegetalojn sur la montetoj, kaj la bela plaĝo estas bona loko por feriantoj. La naturdotitaj kondiĉoj,


historiaj restaĵoj kaj hazardludo tre favoras la turismon de Makao. Statistiko raportis, ke en 1965 miliono da homoj vizitis Makaon, kaj en 1995 la nombro de vizitantoj atingis 8 milionojn, 20-oble kiom ĝia loĝantaro. En la 90-aj jaroj ŝrumpis la poreksporta prilaborado pro la struktura ŝanĝiĝo, kiu okupis la unuan lokon en la ekonomio de Makao, sekve multe pli-graviĝis la turismo kaj hazardludo, kies enspezoj jam konsistigis duonon de la financo de Makao.

La intersanĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj en la pasintaj pli ol 400 jaroj formis la riĉan heredaĵon de politiko, justico kaj kulturo, kiu konservis relative kompletan tradician kulturon de Ĉinio kaj la lokan kulturon de Kantono, kaj ankaŭ entenas la okcidentan kulturon kun la portugala kaj latina kulturoj kiel la ĉefa parto. Krome, ĝi asimilis ankaŭ la kulturojn de Hindio, Malajzio, Afriko, Britio kaj

Ameriko. Ĝi karakteriziĝas per tio, ke konkordo superis kolizion, ekvilibriĝo kontraŭstaron, toleremo separatismon. Ĝi estas ne nur giganta riĉaĵo de la homa civilizacio, sed ankaŭ neelĉerpebla fonto por disvolvo de la turismo de Makao. Antaŭe oni ne donis sufiĉan atenton al tio, kaj nun, antaŭvespere de la reveno de Makao al la patrolando, la makaa registaro faris pozitivajn paŝojn por la kultura konstruado kaj prenis edukadon, kulturon kaj socian protektadon kiel la primarajn aferojn.

Por vigligi turismon, la makaa registaro konstruis kelke da gustoplenaj muzeojn, ekzemple tiuj de konkur-saj aŭtoj, marnavigacio kaj vinfarado. Unuvorte, se la funkcio de la originala kulturo de Makao estos plene utiligita, en la estonteco Makao ankorau povos ludi la rolon interligi Ĉinion kun Eŭropo kaj eĉ kun la latina mondo. ■

Antikva kanono



Respektataj VIRINOJ

de WANG QINGHUA

HANI-OJ vivas en Ailao-montaro, Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. Sur la montoj estas ŝtupar-kampoj. Dum tempo de semado nuboj speguliĝas en la kampoj, kiuj aspektas tre belaj. Estas admirinda tiu subtropika idilia pejzaĝo. Kiu kreis la miraklon?

VIRINOJ LUDAS ĈEFAN ROLON

En la pasintaj kelkmil jaroj hani-oj, sin okupantaj pri terkulturado, konstruis ŝtupar-kampojn en Ailao-montaro, utiligante la naturajn kondiĉojn de geomorfologio, klimato, flaŭro, akvo kaj grundo. En la laborado hani-aj virinoj estis nemankigeblaj.

Laŭ kutimo, hani-oj unue kulturis rizplantiĝojn kaj poste transplantas ilin en la ŝtupar-kampojn. Inter la hani-oj cirkulas popoldiro: "Virinoj ne plugas teron, viroj ne transplantas rizplantiĝojn." Viroj faras pezajn preparajn laborojn, kiel plugado de tero kaj ordigado de kamp-rando. Tiel oni opinias, ke viroj laboras pli multe kaj grave. Tamen statistiko montras, ke por unu hektaro viro laboras 172.5 horojn kaj virino 195 horojn.

Escepte de plugado, erpado kaj ordigado de kamp-rando, virinoj faras ĉiujn kamplaborojn. Ili pagas pli multe da tempo kaj forto por pli streĉa laboro. La rolo de virinoj en laboro sur ŝtupar-kampoj estas alte taksata. Pro tio virinoj en Ailao-montaro estas respektataj.

DIVERSAJ ROLOJ EN FAMILIO

Hani-a familio estas de monogamio. Ĝenerale kelkaj generacioj kune loĝas. Se viroj edziĝas, ili loĝas aparte. Tial kunekzistas familioj



Hani-a virino laborema

multgeneracia kaj unugeneracia, kiuj praktikas patriarkan reĝimon.

Patro respondecas pri organizado de laboro, administrado de financo kaj aliaj gravaj aferoj.

En familio virino unue estas filino kaj poste fariĝas edzino, patrino kaj bopatrino. Virinoj ludas malsamajn rolojn kaj estas respektataj same kiel en kamplaboro pro siaj diligenteco kaj kontribuo al la familio.

Hani-aj knabinoj estas amataj de siaj familioanoj. Ili faras diversajn hejmlaborojn, kiaj lavado de legemoj, portado de akvo kaj kuirado de rizo, kaj fariĝas bonaj helpantoj de sia patrino. Poste ili teksas ŝtofajn, tajloras vestojn, hakas brullignon kaj prilaboras kampojn. Se en familio estas kelkaj gefiloj, la plej aĝa filino devas prizorgi siajn gefratojn.

Bofilino estas grava en familio. En unugeneracia familio ŝi estas edzino kaj patrino kaj zorgas pri familiaj aferoj. En familio de kelkaj generacioj la edzo kaj edzino estas apogoj, kaj la edzino estas pli grava. Hani-oj diras: "Arbege ne povas vivi sen radikoj, familio ne

povas ekzisti sen virino.” Kvankam viroj regas la familion, tamen virinoj (ĝenerale bofilinoj) havas efektivan potencon, ĉar ili zorgas pri posedaĵo, hejmlaboroj kaj konsumado. Bofilinoj faras multflankajn aferojn, ekz. kamlaboro, tajlorado, kuirado, servado al bogepatroj kaj prizorgado al infanoj. Ili laboras pli multe ol la urbaj virinoj. Fakte hani-aj bofilinoj estas subtenantoj de la familio kaj iliaj kondutoj estas tre gravaj por la harmonio kaj stabileco de la familio.

Ekster la familio hani-aj patrino kaj bopatrino estas simbolo de diligenteco kaj saĝo, kaj en familio ili estas aŭtoritatoj. Ili gvidas bofilinon fari hejmlaborojn, teksu ŝtofon kaj eduki infanojn. Por konstrui domon, ili devas mezuri la bazon per silka fadeno. Nur post tio diuj benas la tutan familion. Patrino la unua hakas pajlon por la domo kaj la unua eltiras rizplantidojn, kiam ekas transplantado de rizplantidoj.

Avino devas prizorgi nepojn. Ĉiumatene, kiam aliaj iras kamlabori, ŝi kune kun la nepoj manĝas. Vespere ŝi manĝigas la infanojn. En Ailao-montaro avino ofte estas la unua instruistino de la infanoj. Kaj la infanoj aŭskultas ŝiajn

legendojn, sciojn pri vivo kaj sennombrajn infankantojn.

VIRINOJ EN LEGENDOJ

En la hani-a regiono cirkulas multaj mitoj kaj rakontoj pri virinoj, inter kiuj estas “Numa kaj Bala”. La rakonto diras, ke antaŭe diablo englutis la sunon kaj lunon, kaj la homaro barmarkitis en mallumo kaj frosto. Filino Numa kaj bofilino Bala mortigis la diablon, mem fariĝis respektive suno kaj luno sur la ĉielo kaj donis lumon kaj varmon al la homaro. Hodiaŭ la hani-oj ankoraŭ adoras la sunon kaj lunon. Je mencio pri la suno kaj luno, ili certe rakontas pri Bala kaj Numa.

En la reala vivo, en geneologio de hani-a familio oni vidas la respekton al virinoj. En ĉiu familio estas geneologio, en kiu la unua vorto de la nomo de filo sekvas la lastan vorton de tiu de la patro. La geneologio firmigas la sangan rilaton de vira devenlinio kaj garantias la heredon de familia posedaĵo. Tamen senescepte en la unua vico de la geneologio estas la nomo “Aoma”, prapatrino. Ŝi estas vaste rekonita inventinto de agrikulturo. ■

Post laboro



“Amo en la tempo de reto”

Aperos la unua ĉina filmo pri reto, kies titolo estas “Amo en la tempo de reto”. Tio ŝajne informas, ke Ĉinio, kvankam ne tre forta en ekonomio, tamen eniras en la tempon de reto. Se amo, plej atentata de la junuloj, ligiĝas kun reto, ĉu interreto jam eniris diversajn flankojn de ilia vivo? La artikolo “Ĉinoj kaj interreto” aperinta en la 6-a numero de 1998 donis al vi ĝeneralan aspekton. Ĉi-foje ni venu al junaj ĉinaj ret-amantoj, kaj rigardu ilian vivon en la tempo de reto kaj ilian amon al la interreto.

Yu Tao

FONO DE LA AMO

Mi imagis la enhavon de la filmo laŭ ĝia titolo. Sed mi eraris: la filmo diras, ke en la interreto ne estas amo. Fakte, en la filmo interreto estas nur simbolo de tempo — en la 90-aj jaroj, televido, portebla telefono, komputilo kaj interreto eniras en la vivon de ĉinaj junuloj. Tiuj modernaĵoj iĝis fono de la kariero, vivo kaj amo de la junuloj. La filmo “Amo en la tempo de reto” celas ne diskonigi sci-ojn pri la reto, sed prezenti amon en la informa epoko.

Kian rolon ludas la interreto en la vivo de ĉinaj junuloj? Ĉu gravan? Tamen sen ĝi ili vivus ankaŭ tre gustoplene. Ĉar en Ĉinio la interreto ne havas tiel multe da servoj kiel en Usono. Ĉu malgravan? Se oni ne konas interreton nek uzas ĝin, li ne povas esti rigardata kiel moderna junulo. Fakte, interreto estas parto de la modo. Ĝi formas modelon de ĉina junulo intelekta, prudenta kaj esperplena. La titolo de la filmo havas ankaŭ komercan valoron, kiu allogas rigardantojn en la kina merkato. Eble kiam la filmo surmerktiĝos, la junuloj demandos unu alian: “Ĉu vi rigardis la filmon pri reto?”



Ĝuo de ret-informoj

MODO DE LA VIVO

En Pekino estas interretaj kafejoj. Paginte tie sumon da mono oni rajtas sendi kaj ricevi elektronikajn poŝtaĵojn, legi retpaĝojn kaj preni dokumentojn. Al tiaj retkafejoj venas ĉefe junuloj.

La unuaj retkafejoj en Ĉinio aperis en 1997. Nun en grandaj urboj, kiaj Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj Shenzhen, troviĝas tiaj kafejoj. Por studentoj kaj junaj urbanoj sperti “ciferan vivon” en

la retkafejoj estas modo.

En retkafejo proksime de la Pekina Universitato, studentoj dezirantaj studi en aliaj landoj kontaktiĝas kun ties universitatoj per retpoŝto, kiu malmulte kostas kaj tre rapidas. Tiuj, kiuj verkas disertaciojn, per la reto serĉas materialojn kaj kopias dokumentojn, ĝuante la sciencajn kaj kulturajn fruktojn de la tuta mondo. Apud la ŝtata biblioteko de Ĉinio en Pekino, staras alta reklama ta-

bulo de iu retkafejo. La reklamo diras al la pasantoj, ke kafo bone gustas kaj la interreto interligas la kafejon kun la tuta mondo.

En Eŭropo, retkafejo estas etendiĝo de salona kulturo, kaj tie oni disvastigas interreton. En Ĉinio oni praktike utiligas ĝin: kontaktiĝi kun la ekstera mondo, preni dokumentojn kaj tralegi retpaĝojn. Ĉu por studado ĉu por amuziĝo, ĉinoj postulas utilecon de la reto. La posedantoj de retkafejoj celas profiti. Por la junuloj, kiuj ne havas komputilon, retkafejo estas tre utila. Ĝi estas loko de renkontiĝo de ret-amantoj, ekz. en Ŝanhajo la ret-kafejoj estis plenplenaj en festaj tagoj. La junuloj ludas kaj konkuras en la reto kaj interŝanĝas spertojn pri reta agado. Tiel retkafejo pli proksimiĝas al salono aŭ kafejo je ĝiaj tradiciaj sencoj.

FIKCIO DE LA SOCIO

Qinghua-universitato estas unu el la pintaj ĉinaj politeknikoj. Ĝi la unua en Ĉinio renkontas la no-

van teknikon, do estas facile kompreneble, ke studentoj de ĝia fakultato de komputilo-tekniko spontanee starigis reton en sia loĝdomo.

Ĝenerale la ĉinaj studentoj loĝas kune en la universitata tereno. Parton de libera tempo ili pasigas en la loĝdomo. La "9#reto" estas kreita ĝuste de studentoj, kiuj loĝas en la domo "9#" de Qinghua-universitato. Komence ili utiligis ĝin nur por dokumentoj. Poste interligiĝis pli ol cent dormoĉambroj en la domo. La "9#reto" iĝis fikcio de la socio. Ĝi estas centro de informoj. Foje iu demandis en la reto pri horaro de trajno. Multaj donis respondon. Iu eĉ metis horaron de ĉiuj trajnoj en la reton, por ke ĉiuj povu ĝin konsulti. La "9#reto" estas ankaŭ forumo, kie multaj diskonigas siajn opiniojn. Iu studento publikigis 8 884 artikolojn en ĝia "Bultena Tabulo", tio ja estas kontentiga atingo por juna studento. Iuj diris: "Sen 9#reto la vivo estos neimageble seka."

"Vi povas ludi tri rolojn en la

reto," diris iu "civitano" de 9#reto. "Unue, homo, kiu vi plej deziras esti en la reala vivo; due, homo, kiu kun alia karaktero vi deziras esti; kaj trie, homo, kiu estas mala al vi en la reala vivo." Multaj studentoj en la reto ludas rolon malsaman ol en la reala vivo, kaj la reago de aliaj ret-civitanoj foje influas ilian vivon kaj instigas ilin klopodi al la idealo.


Kio la reto estas? Iuj diras, ke ĝi estas poŝtofiĉejo, telefono, telefakso, amaskomunikilo, lernejo aŭ amuzejo. Aliaj opinias, ke ĝi estas libera spaco por realigi la revon, bela sonĝo por eviti la realan vivon, amuzejo por sin senbridigi kaj ekspresa vojo al sukceso. Sed kio la reto estas kaj kia ĝi estos en la estonteco, pri tio neniu povas doni klaran respondon. En tiu senco reto tre similas al amo — en miloj da jaroj homoj demandas: Kio estas amo? La respondon ni ne havas. Tamen ni konscias, ke ni vivas, amas unu alian en la tempo de reto, tio estas nia feliĉo. ■

Ĉina junularo statistike

Ĉina Informa Centro de Interreto ĉiun duonjaron publikigas statistikon pri interreto en Ĉinio. Laŭ la plej freŝa statistiko (ĝis la fino de la jaro 1998), en Ĉinio estas 21 milionoj da ret-uzantoj, kies 90% estas viroj, kaj 80% estas 21-35-jaruloj. Do ĉinaj ret-uzantoj estas ĉefe junaj.

Yu Tao

Multiĝo de ret-uzantoj en Ĉinio



LONGJING-TEO

Hangzhou estas fama turisma urbo de Ĉinio. Estas fama ankaŭ ĝia Longjing-teo produktita en Longjing-vilaĝo ĉe la Okcidenta Lago. Jam en "Libro pri Teo" verkita en Tang-dinastio (618-907) legiĝas notoj pri Longjing-teo. Oni diras, ke imperiestro Qianlong (1711-1799) de Qing-dinastio faris tie inspektadon. Li trinkis Longjing-teon kaj multe admiris ĝin. Li titolis 18 tearbojn tie kreskantajn imperiestraj tearboj. Printempe, kiam la tearboj prosperas, la tieaj teĝardejoj sur montodeklivoj estas ofte vualitaj de nuboj kaj nebuloj, kio estas tre utila al la tearboj. Krome, pro la zorgema kultivado, modera klimato kaj abunda pluvo, la tie produktita teo estas superba.

Longjing-teo el freŝaj ŝosoj kaj folioj estas plej bona, se ili estas plukitaj je 3 tagoj antaŭ la sunperiodo Brilo kaj Klaro (la 4-a aŭ 5-a

de aprilo). Tia seka teo estas trezora kaj ĉiu kilogramo da ĝi konsistas el 60 000-80 000 junaj ŝosoj. Se la teo estas plukita inter la 5-a kaj 20-a de aprilo, sur la tigo estas malgranda folio simila al flago. Ankaŭ tia teo estas bonkvalita.

La superan Longjing-teon oni bakas per elstara teknologio. Ĝenerale, oni sternas la plukitajn freŝajn tefoliojn en domo por 7-8 horoj kaj poste metas ilin en glatan poton. Oni traktas la tefoliojn por fari ilin verdaj, bonodoraj, bongustaj kaj belformaj. Unu spertulo en la tuta tago povas prilabori nur unu kilogramon da tia teo.

DIABLA URBO

En la nordokcidento de Xinjiang, Ĉinio, estas urbeto Wurhe. Proksime de ĝi staras montoj altaj kaj malaltaj, krutaj kaj malkrutaj. Rigardate de malproksime, ili similas al impona kastelo.

Sed rigardate de proksime iuj

similas al nobelaj domoj, aliaj al drinkejoj, triaj al kabanoj kaj kvaraj al viglaj bestoj, starantaj sur stratoj kaj placoj kiel skulptaĵoj.

Jen la diabla urbo. Ĉiufoje, kiam leviĝas vento, ĝia bruado similas al terura blekado de miloj da sovaĝaj bestoj, kvazaŭ sennombraj diabloj rajdus tien sur nigraj nuboj por kunveno.

La diabla urbo estas formita de venta erozio.

Fakuloj diris, ke antaŭ 200 milionoj da jaroj tie estis vasta maro kun tavoloj da sedimentaj rokoj sur la marfundo, kie ŝlimo kaj erco kuŝas unu sur la alia. Poste pro leviĝo de la terkrusto, la maro ŝanĝiĝis en teron kaj la sedimentaj rokoj malkovriĝis. Ĉar la rokoj estis malmolaj, ilia supro facile ebeniĝis pro venta erozio, kaj ŝlima tavolo estis facile eroziita. Jen kial tie aperis multe da strangaj "konstruaĵoj" kun ebena supro, kiuj konsistigas la "kastelon".

Diabla urbo



Vento faris la kastelon, dum ĝi mem devas zigzage iri inter la "konstruaĵoj", sekve de tio ĝi ne simple blovas, sed tre terure blekas.

ANTIKA FLORO

En 1990 ĉina paleontologo prof. Kong Ge kaj la de li gvidata grupo trovis en Heilongjiang-provinco, Ĉinio, angiosperman fosilion, la plej antikvan en la mondo. La floro estas maskla kun infloresko kaj poleno. Ĉiu polenero dikas 15-20 mikronojn kaj ĉiu infloresko longas 1.4 cm kaj larĝas 0.4 cm. Sciencistoj konstatis, ke la floro vivis antaŭ 130 milionoj da jaroj. Oni trovis entute 80 similajn fosiliojn.

Preskaŭ en la sama tempo usonanoj trovis en Izraelio poleneran fosilion (sed ne la infloreskan), tre similan al tiu malkovrita de ĉinaj sciencistoj. Ankaŭ ĝi ekzistis jam 130 milionojn da jaroj. Estas bedaŭrinde, ke la fosilio ne estas sur floro.

Trovinte la angiospermon, prof.

Kong kaj lia grupo etendis sian esploradon al pli okcidenta loko de Liaoning-provinco. En iu aŭtuna vespero de 1996, kiel kutime, prof. Kong observis la nove trovitajn fosiliojn per mikroskopo. Sub la mikroskopo aperis fruktobranĉo simila al tiu de la nuna magnolio kaj portanta dekojn da spirale kreskantaj fruktoj ĉiu kun 2-4 semoj. Sub la branĉoj estas malklare vidataj du pecoj, kies konsisto similas al tiu de folio.

Post du-jara esplorado oni venis al la konkludo, ke tio estas angiosperma fosilio de 145 milionoj da jaroj. La 27-an de novembro 1998 la grupo publikigis en la usona revuo "Sciencoj" la rezulton de sia esplorado kaj donis al tiu floro la nomon "nova specio de nova genro de antikva frukto Liaoning".

BIBLIO EN ĈINIO

En 1937 la Ĉina Asocio de Biblio unuafoje eldonis Biblion en Ĉinio. De 1937 ĝis 1955 Ĉinio distribuis entute 1.7 milionojn da

ekzempleroj de tiu libro. La Biblio eldonita post 1955 plejparte estis bindita kun leda kovrilo.

Post la 10-jara kaoso (1966-1976) en la kristanismo preĝejoj de Ĉinio reaperis la paca etoso. Nun la ĉinaj kristanoj havas entute 12 000 preĝejojn. En 1980 Ĉinio denove eldonis Biblion kaj de tiam ĝis hodiaŭ oni presis entute 15 milionojn da ekzempleroj de Biblio. La nove presitaj libroj havas du eldonojn, t.e. tiun kun malnovaj ĉinaj ideogramoj kaj tiun kun simpligitaj ideogramoj, kaj krome, estas ankaŭ Biblio en la korea, mjaŭa, lisu-a, ji-a, ĝingpo-a, va-a kaj lahu-a lingvoj, tiu kun grandaj ideogramoj taŭgaj por maljunuloj kaj tiu poŝe portebla. Oni eldonis ankaŭ brajlan eldonon.

La kompanio, kiu presis grandan kvanton da bonkvalitaj libroj de Biblio, ĝuas grandan reputacion en kaj eksterlande. Ĝin vizitis multaj eksterlandaj kristanoj, inter kiuj ne mankis kristanoj internacie famaj.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Donanzan Gabriella dez. kor. tm. Adr.: Via Caile N-6, Schio 36015, Vicenza, Italio.



* Annel Haehl, 53-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, precipe paco kaj poezio. Adr.:

616 Illinois St. Lawrence, KS 66044-23240, Usono.

*Umid Soft serĉas kontaktojn tm. por geedzigaj celoj. Adr.: Samarkando a/k 10, 703000 Uzbekistano.

*Alvaro Rabelo dez. kor. Adr.: C.P.21, Cascavel, 85 808-970 - PR. Brazilo.

*Miloslav Švaček dez. kor. Adr.: Tršická 6, CZ-75127 Pencice, Ĉeĥio.



Ĉinio reakiris 3000 historiajn

Antaŭ tri jaroj la brita polico retenis nombron da historiaj restaĵoj. Ekspertizo de ĉinaj fakuloj konstatis, ke 3 000 el ili apartenas al Ĉinio. Sekve la ĉinaj instancoj postulis redonon, kaj de tio estiĝis intensa klopodado pro la kulturaj restaĵoj.

de YI YUN

POSTTAGMEZE de la 13-a de marto 1998 ĉina kargoŝipo ekveturis de la Londona Haveno de Britio, kunportante 3 000 valoregajn historiajn restaĵojn. Fine tiom da valoregaj historiaj restaĵoj de Ĉinio, kontrabanditaj en Brition kaj tenataj tri jarojn en la konservejo de la Aŭkcioj Kristi, revenis al Ĉinio.

En 1994 kaj en la komenco de 1995 la kultura konsilio de la ĉina ambasadorejo en Britio kaj la brita polico samtempe ricevis plurajn anonimajn leterojn, kiuj denunciis la suspektin-

dajn kontrabandintojn de ĉinaj historiaj restaĵoj, la kanalojn de la kontrabando, la nombron kaj negocadon. En marto 1995, laŭ la denunco la brita polico retenis en du havenoj du grandajn partojn da historiaj restaĵoj, sume 6 000 pecojn. Sed la brita polico ne havis sufiĉan ateston por konstati, ke tiuj historiaj restaĵoj estis kontrabanditaj el Ĉinio, sekve ĝi ne povis verdikti, kaj devis redoni la retenatajn objektojn al la suspektatoj. Jen la brita polico konsilis, ke ĉinaj fakuloj faru ekspertizon pri tiuj historiaj restaĵoj.

Post esplorado de 4 tagoj oni konstatis, ke granda parto de la kontrabandaĵoj estas ĉinaj ob-

jektoj, kaj la aliaj estas kopioj, malnovaj metiartaĵoj kaj alilandaj historiaj restaĵoj. Granda parto de tiuj ĉinaj historiaj restaĵoj estis elfosita kaj kontrabandita en la lastaj jaroj kaj parto de la antikvaĵoj de Ming-kaj Qing-dinastioj (1368-1911) estis ŝtelita en ĉinaj temploj. Multaj el la ŝtelitaj objektoj estas tre valoraj por arkeologia studo kaj scienca esplorado, ekzemple ŝtonaj tranĉiloj de neolitiko, fajencaĵoj, bronzaĵoj de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), epitafoj de Tang-dinastio (618-907) kaj fosilioj de dinosaŭraj ovoĵoj. Krome, oni trovis ankaŭ atestojn pri la deveno de la



restaĵojn

malkaŝiĝo, notoj pri la vojaĝoj de la ĉefaj suspektatoj inter Britio, Hongkong kaj la ĉina ĉeftero, registro pri importado de antikvaĵoj en Hongkong, ĝirkonto por la negoco de la antikvaĵoj, dokumento pri la ekspertizo de la ĉinaj fakuloj por la historiaj restaĵoj kaj dokumento pri ekspliko de ĉinaj justicaj specialistoj pri la ĉina leĝo de historiaj restaĵoj, kaj raporto pri la enketado al la priŝtelitaj lokoj.

Sed la kazo alfrontis grandan komplikadon. Respektive en 1970 kaj 1995 Ĉinio aliĝis al la "Konvencio pri Kulturaj Heredaĵoj" de Unesko kaj la "Konvencio pri Malpermeso kaj Prevento de Kontraŭleĝa Importado kaj Ekspordado de Kulturaj Posedaĵoj kaj Kontraŭleĝa Transdono de Ilia Proprieto", aprobita en la Roma Diplomatia Konferenco. Tiuj konvencioj postulas, ke ĉiu ajn membro-lando de la konvencioj devas senrekompence redoni la historiajn restaĵojn al la landoj ĝuantaj la proprieton. Sed Britio ne aliĝis al tiuj du konvencioj. Krome, nur la brita civila tribunalo rajtas juĝi pri la proprieto de historiaj restaĵoj. La situacio malfavoris al la ĉinaj instancoj.

Dume unu el la suspektatoj skribis al la ĉina ambasadorejo en Britio, pretendante, ke la retenataj historiaj restaĵoj estis leĝe importitaj kaj aĉetitaj en Britio. Li komplete malkonfesis sian krimon, minacis per akuzo kontraŭ la ĉinaj instancoj kaj postulis reprenon de la historiaj restaĵoj kaj kompenson pro la retenado.

Ĉar la antikvaĵoj estis trovitaj ĉe la suspektatoj, oni devis unue konsenti la supozon, ke la antikvaĵoj apartenas al ili, dum la ĉinaj instancoj bezonis multajn penojn por pruvi, ke tiuj antikvaĵoj ne apartenas al ili. Por tio la ĉina flanko multe klopodis. Sed tiam okazis io abrupta: du ĉefaj suspektatoj proponis intertraktadon por paciĝo, kaj ankaŭ la brita tribunalo inklinis al eks-

terjuĝeja paciĝo.

Je la 10-a antaŭtagmeze de la 22-a de januaro 1998 intertraktado havis lokon en la konservejo de la Aŭkciejo Cristi. Rivalis ĉinaj fakuloj, famaj britaj arkeologoj invititaj de la ĉinaj instancoj, britaj policanoj kaj proĉinaj advokatoj en unu flanko kaj la du suspektatoj kaj iliaj advokatoj en la alia flanko. La ĉinaj fakuloj la unuaj elmetis siajn starpunkton, sintenon kaj fidon pri sia nedubbla venko en la proceso, ĉar la ĉinaj instancoj posedas sufiĉajn atestojn por pruvi, ke tiuj historiaj objektoj estis ŝtelitaj en Ĉinio kaj kontrabanditaj el ĝi. Kaj la suspektatoj konfesis, ke ili ne havas monon nek tempon por daŭrigi la proceson, sed samtempe ili artifikis dirante, ke la ĉinaj instancoj elektu parton de la valoraj antikvaĵoj kiel ilian donacon por Ĉinio, sed restigu al ili la ceteran grandan parton. La ĉinaj fakuloj tuj refutis insistante, ke Ĉinio rajtas posedi ĉiujn retenatajn antikvaĵojn, kaj ke tiuj objektoj neniom rilatas gravecon aŭ malgravecon, nek donacadon; escepte de 46 pecoj, kiuj antaŭlonge estis ekster Ĉinio, kelkaj difektitaj pecoj kaj novaj kopioj, ĉiuj historiaj restaĵoj devas esti senkondiĉe redonitaj al Ĉinio, nenia marĉando estas akceptebla.

Fine la longa rivalado kondukis al interkonsento: la suspektatoj agnoskas la proprieton de Ĉinio super ĉiuj historiaj restaĵoj escepte de la alilandaj antikvaĵoj, kopioj kaj tiuj pecoj aĉetitaj en bazaro, sed retenataj de la polico samtempe kun la aliaj objektoj, entute 400, dum la aliaj 3 000 devas esti redonitaj al Ĉinio.

La 10-an de februaro de 1998, la interkonsento pri redono de la historiaj restaĵoj kaj la dokumentoj de la brita tribunalo kaj polico konfirmantaj la interkonsenton estis subskribitaj. La proceso finiĝis per sukceso de la ĉinaj instancoj. ■

kontrabandaĵoj: en la epitaĵoj oni rimarkis loknomojn de Ĉinio, la pakumoj kaj kestoj estas ĉinaj produktaĵoj, parto de la pakumoj estas ĉinaj provincaj ĵurnaloj, parto de la fajencaĵoj surhavas argilon de la tombo, la lakitaj lignaĵoj estas saturitaj de akvo kiel ankoraŭ en la tombo kaj ne estas traktitaj per senakvigo.

Post ekspertizado la ĉinaj instancoj konstatis, ke tiuj historiaj restaĵoj estas posedaĵoj de Ĉinio, kaj postulis, ke ili estu redonitaj al Ĉinio.

Samtempe ankaŭ la brita polico multe laboris por helpi la kazon donante multajn gravajn atestojn: fotoj de suspektatoj ĉe

Ĉinaj kutimoj ĉe la manĝotablo

Interesas min la ĉinaj kutimoj ĉe la manĝotablo.

MARIAN KOSTECKI (Pollando)

de PANG NAIYING

EN Ĉinio diferencas la popolaj kutimoj en diversaj lokoj. Ankaŭ la kutimoj kun komuna kultura origino ĉe la tablo estas diversaj. Jam en la 11-a jc. a.K. la kortego de Zhou-dinastio ella-

BASTONETOJ KAJ KUNA MANĜADO ĈE LA TABLO

En la mondo estas pluraj manĝmanieroj: Eŭropanoj kaj nordamerikanoj prenas manĝaĵojn per forko kaj kule-ro; parto de la afrikanoj kaj loĝantoj de Mez-Azio per mano, dum la ĉinoj per bastonetoj te-

por ilin brogi en bolanta akvo... En Ĉinio nun neniam manĝilo povas anstataŭi ilin, tial kvankam en neolitiko antaŭ 7000 jaroj jam aperis platforma kulero kaj dudenta forko, tamen faktoj pruvis, ke oni preferas la bastonetojn al tranĉilo kaj forko.

Ĉe la tablo okcidentanoj tenas tranĉilon per la dekstra

mano kaj forkon per la maldekstra. La du manoj kunlaboras dum la manĝado, tamen ĉe la tablo la ĉinoj neniam prenas manĝaĵojn per la du manoj kune. La ĉetabla etiketo difinis, ke oni devas preni rizon per kulero kaj preni almanĝaĵojn el pladoj per manĝbastonetoj nepre tenataj per la dekstra mano. Tiuj reguloj, troveblaj en la kortega dokumento, poste fariĝis ankaŭ familia tradicio de la ordinaraj ĉinoj. Tial ekde la unua tago, kiam la ĉinaj infanoj komencas uzi manĝbastonetojn, oni instruas al ili, ke ĉe la tablo estas



Tosto

boris etiketan regularon kaj metis la ĉetablan sur la unuan lokon. Tiuj reguloj herediĝis de generacio al generacio kaj iuj el ili estas observataj eĉ hodiaŭ.

nataj per la fingroj dika, montra kaj meza. Per ili oni povas ne nur laŭvole preni el pladoj, longajn vermiĉelojn, sed ankaŭ forigi ostojn el fiŝaĵo kaj teni maldikajn tranĉaĵojn de viando

malpermesate preni el pladoj proksimaj al aliaj homoj, nek fosi per la bastonetoj en la pladoj kaj foje refoje preni la ŝatatajn enhavojn. Kiam plenkreskuloj donas al ili rizon, ili

devas akcepti ĝin per la du manoj kune. Antaŭ ol la grandaĝuloj kaj gastoj prenas manĝaĵojn, la junuloj kaj mastroj ne devas ekmanĝi...

La ĉinoj ĉiam kunmanĝas el komunaj pladoj en familia manĝo kaj dum la oficiala bankedo. Kvankam oni decidis observi la porcian manĝmanieron de la okcidentanoj en la ŝtata bankedo, tamen ĝi malfacile populariĝas en la ĉiutaga vivo. Kvankam la manĝmaniero de la okcidentanoj estas higiена, tamen ĉe la tablo mankas ia gaja atmosfero, kaj plie, tiamaniere sur tablo ne plu vidiĝos la artisma plastiko de la ĉina gastronomio.

Fakte en la prahistorio ankaŭ la ĉinoj prenis manĝaĵojn ĉiu sian porcion. Tiam oni sidis surgenue sur mato kaj ĉiu havas antaŭ si tableton kun vino kaj manĝaĵoj. La hodiaŭa manĝmaniero komenciĝis en la 7-10 jc. a.K., kiam aperis longpiedaj tabloj. Poste oni iom post iom konis la malbonajn flankojn de tiu kutimo kaj almetis paron da komunaj manĝbastonetoj krom tiuj por ĉiu manĝanto.

Nun, ĝenerale, oni proponas pladojn al gastoj per la komunaj bastonetoj. Dank' al interŝanĝo inter la ĉina kaj okcidenta kulturo la ĉinaj manĝbastonetoj estas uzataj ankaŭ en multaj aliaj landoj, dum la memserva maniero de Okcidento estas ŝatata ankaŭ en Ĉinio.

VINO, NEMANKIGEBLA PARTO DE FESTENO

Same kiel multaj aliaj nacioj, ankaŭ la ĉinoj havas striktan rilaton kun vino. En Ĉinio en ĉiu festeno nepre devas esti vino. Ĉe la tablo la maldekstra loko estas rigardata kiel la honora, tial respektata gasto ĉiam sidas maldekstre de la mastro, dum la aliaj sidas laŭvole. Altabliĝinte, la mastro devas leviĝi por tosti la gastojn kaj tiuj

leviĝas por esprimi sian dankon kaj per unu tiro eltrinkas la tason. Post surtabliĝo de ĉiu plado la mastro devas proponi vinon al la gastoj kaj la gastoj reciprokas tion al la mastro. Ĉe la fino de la festeno ĉiuj leviĝas kaj eltrinkas la tason.

La ĉinoj diras, ke eĉ mil taso da vino ne sufiĉas por kuna drinko de intimaj amikoj. Estas ja granda ĝojo por la ĉinoj, kiam ili drinkas kun siaj parencoj kaj amikoj. Malsufiĉa drinko ofte kondukas al malcontento. Tiam se la mastro ne povas daŭre drinki, li do devas peti alian por proponi vinon al la gastoj.

Ĝenerale dirite, la sudanoj proponas vinon modere kaj permesas al la gastoj drinki laŭ sia povo, dum la nordanoj kaj precipe la loĝantoj de Shandong-provinco kondukas alimaniere: Ili insiste proponas vinon al la gastoj kaj faras ĉion eblan por ke la gastoj pli multe drinku.

En nordokcidenta Ĉinio oni ŝatas plezurigi drindadon per fingro-gesta ludo. La du drinkantoj tre rapide faras gestojn por montri nombron de unu ĝis kvin kaj ĉiu devas diri la totalan sumon de la du gestoj. Kiu maltrafe diras la sumon, tiu estas punata per trinko de taso da vino. Tiamaniere ĉe la tablo la gastiganto kaj gastoj ĝoje drinkas kaj ofte ĝis ebriiĝo.

RESPEKTO AL MALJUNULOJ, KULTO AL PRAPATROJ KAJ BENOPETO

Multaj opinias, ke ĉe la tablo oni tre facile montras intimecon de la homoj. La ĉinoj ĉiam rezervas la honoran lokon al maljunuloj, proponas al tiu pladon kaj supon. La ĉinoj donas grandan atenton al spirita prizorgo de la maljunuloj. Pro labora okupiteco oni ne havas tempon por akompani siajn maljunajn gepatrojn kaj geavojn kaj

do babilas kun ili ĉe la tablo por ke ĉiuj ĝuu la familian feliĉon. Por festi datrevenon de la naskiĝo de la gepatroj kaj geavoj oni certe preparas longajn vermicelojn simbolantajn longan vivon.

Interesa ja estas la vespermanĝo antaŭvespere de la Printempa Festo en la ĉina kamparo. Antaŭ la manĝado grandaĝulo de la familio kondukis infanojn al la kulta tablo kun prapatraj nomoj por surgenue saluti ilin kaj mallaŭte inviti la spiritojn de la prapatroj al la kuna manĝado. Post tio la grandaĝulo revenas al la tablo kaj akceptas gratulon de la tuta familio.

Estas ja abunda la vespermanĝo antaŭvespere de la Printempa Festo: faruna persiko, moĉio el glueca rizo, faruna fiŝo, kiuj simbolas longan vivon de la homoj, abundan rikolton kaj riĉan vivon. La *ĝjaŭzi*-oj enhavas diversajn bonaŭgurajn objektojn, per kiuj laŭdire oni povas diveni la sorton, tial ĉiuj ŝatas ilin. La *ĝjaŭzi*-o kun monero simbolas riĉiĝon en la venonta jaro, tiu kun bombono simbolas dolĉan amon. Se novedzino prenas tiun kun kaŝtano, ŝi certe estas tre ĝoja, ĉar tio aŭspicias, ke ŝi baldaŭ havos sanan filon.

En Ĉinio oni aranĝas terkulturajn aferojn laŭ la 24 sunperiodoj. Oni ŝvitas super kampalaboro kaj ĝuas feliĉon ĉe la tablo, ne forgesante dankon al la naturo. En la sema sezono oni donas festenon al la tero kaj post rikolto per bongustaj manĝaĵoj anoncas la riĉan rikolton.

Kun la socia progreso la benopeto kaj kulto al la naturo fariĝas pli kaj pli malmultaj, reduktiĝas ankaŭ la etmanĝaĵoj destinitaj por sunperiodoj kaj multiĝas bongustaĵoj, tamen la diversaj etmanĝaĵoj kun lokaj gustoj facile rememorigas pri la longa pasinteco kaj antikvaj legendoj. ■

Vivo en malliberejo



Legom-kulturado

Fotoj de ZOU YI

Oni facile imagas al si, ke malliberejo estas loko, kie tintas man- kaj pied-katenoj de la malliberuloj dolorplenaj. Fine de la pasinta jaro mi vizitis 6 malliberejojn en Shandong-provinco kaj rimarkis, ke tie la vivo estas bone organizita kaj severe disciplinita.

Samkiel malliberejoj en aliaj landoj, la ĉinaj punas krimulojn, tamen ilia ĉefa tasko estas transformi ilin. Laŭ la klasifiko kaj graveco de krimoj kaj puntemplimo kaj pento de la malliberuloj oni faras diferencajn kontrolojn. Krome oni ankaŭ donas al la malliberuloj sistemajn kaj oficialajn lekcionojn pri leĝo, moralo, kulturo kaj tekniko kaj kuraĝigas ilin diligente studi en la televida kaj koresponda lernejoj. En la malliberejoj oni funkcigas diversajn teknikajn kursojn, por ke la malliberuloj estu transformitaj psike kaj facile trovu okupon post sia elkarceriĝo.

En la malliberejoj la malliberuloj devas fari fizikan laboron, se ilia sanstato permesas, kaj pro tio ili ricevas certan rekompencan. La malliberulojn povas viziti iliaj familianoj en difinita tempo. Krom fizika laboro kaj lernado la malliberuloj havas ankaŭ kulturajn aktivadojn.

Telefonado al familianoj



Libroservo en malliberejo



Riparado de elektronikaj aparatoj



Kelkaj vortoj por la patro malliberigita

Malliberuloj



Vortenigmoj

de M. Bajkov (Rusio)

Zodiako

Tasko: En la tabelo trovu kaj elstreku nomojn de zodiakaj stelaroj, skribitaj sub la tabelo. Direkto de skribado de vorto povas turni nur je 90° (rekta angulo), ekz. SKORPIO. El liberaj (restaj) literoj formu vorton. La vorto estas nomo de planedo. Kiun?

O	→	R	→	P	O	R	L	E	A	K		
↑	K	←	S	↓	I	→	O	G	O	O	P	R
I	G	U	V	I	O	N	K	I				
T	A	S	F	O	N	R	O	Ĝ				
A	R	Ŝ	A	E	O	E	M	E				
O	I	T	A	Ŭ	R	L	O	J				
R	O	F	M	A	O	S	A	K				
O	F	I	O	V	E	P	N	K				
J	O	Ŝ	L	I	S	N	O	R				

ŜAFO KANKRO PESILO KAPRIKORNO
TAŬRO LEONO SKORPIO AMFORO
ĜEMELOJ VIGRO SAGITARIO FIŜOJ

La besta kronologia sistemo de Ĉinio

Tasko de la vortenigmo estas sama kiel la unua, sed vortoj en la tabelo estas nomoj de jaroj laŭ besta kronologia sistemo de Ĉinio, kiel LEPORO. Liberajn literojn skribu en malplenajn ĉelojn sub la tabelo kaj vi ekscios nomon de bela astro. Kiun?

P	O	R	K	O	O	R	G		
I	M	I	R	A	K	O	I		
O	L	S	D	O	→	R	→	O	T
O	B	O	O	↑	P	O	T	N	
D	O	V	K	E	←	L	N	E	
N	U	H	O	K	M	U	P		
Ĉ	E	V	Ŝ	O	O	S	R		
O	L	A	A	F	U	S	E		

MUSO LEPORO ĈEVALO KOKO
BOVO DRAKO ŜAFO HUNDO
TIGRO SERPENTO SIMIO PORKO

Botelo kun bildo de drako en nuboj

La nomita botelo el diafana vitro havas trumpetan buŝon, mallarĝan kolon, barelan ventron kaj platan fundon. Sur ĝia kolo estas purpuraj bananaj folioj kaj sur ĝia ventro purpura drako ludanta globon en nuboj. Tiu artaĵo alta je 29.5 cm, farita en 1736, estas malpeza kaj delikata majstroverko el la antikvaj ĉinaj vitraĵoj.





Lijiang-rivero

Foto de WANG TIANRI

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

04>



世界语《中国报道》一九九九年第四期

(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11-1339/G2